

LITERATURA SUPLEMENTO

Eldonis la Esperanto-Ligo por Norda Ameriko

P.O. Box 1129

El Cerrito, CA 94530

Usono

tel. (415) 653-0998

Redaktis Donald J. Harlow

1991

ADRESO AL LA 5A KONGRESO DE LA ESPERANTO ASOCIO DE NORDA AMERIKO

de d-ro D. O. S. Lowell, Vic-Prezidanto de EANA

en Bostono, la 10an de julio, 1912

Estas vere feliĉa okazo, tiu ĉi en kiu ni trovas nin hodiaŭ, kiam de diversaj lokoj de nia larĝa kaj bela lando tiom da entuziasmoj kunvenas. Ni venas por saluti kaj manpremi unu la alian; por aŭdi la belajn sonojn de nia kara lingvo; por lerni kiel Esperanto taŭgas en la ĉiutagaj, la komunaj aferoj de la vivo; por gajni facilecon kaj fluecon de esprimo per sperto; kaj fine, sed ne malĉefe, por pruvi al la skeptikuloj ke la elpensado farita antaŭ dudek-kvin jaroj de Doktoro Zamenhof estas praktika, vere internacia lingvo, kiu ĉiutage pli disvastiĝadas tra la mondo.

Hodiaŭ matene ni malfermas la kvinan Nacian Kongreson de Esperanto en Norda Ameriko. La unua okazis en Chautauqua en 1908; la dua, en la sama loko en la sekvinta jaro; la tria en Washington, kune kun la Sesa Internacia Kongreso; la kvara, en New York, antaŭ unu jaro.

Eble nur malmultaj el tiuj, kiuj ĉeestis Chautauqua en 1908 ĉeestas la nunan Kongreson. Kelkaj el ili, bedaŭrinde, mortis; kelkaj trovis,—aŭ pensis ke ili trovis,—la vojon tro malfacila, kaj tial ili elfalis; kelkaj pro neeviteblaj kaŭzoj forestas. Sed Esperanto daŭras; Esperanto vivas; Esperanto estas ne nur ĉi tie, sed ĝi estas ĉie tra la mondo. Ĉu kelkaj nin aliĝas, aŭ ĉu kelkaj nin forlasas, Ĝi vojiras je eterne. Ĝia stelo brilas kaj ĉiam brilos,

kaj ĝia standardo ĉiam restos verda.

Mi supozas ke la plejmulto el vi, kiuj aŭdas min, estas bonaj esperantistoj; tamen kelkaj eble estas nur kuriozuloj, al kiuj mi ne volas paroli, ĉar vi komprenas nek la vortojn Esperantajn nek la Esperantan ideon. Kontraŭe, kelkaj el vi estas bonaj Esperantistoj, kvankam vi ne nur ne povas kompreni tion, kion mi nun diras, sed ankaŭ vi legas eĉ simplan Esperantan prozaĵon nur malfacile; sed se laŭ via opinio estus bona afero ke la tuta mondo komprenu unu la alian, kaj se vi volas kaj kuraĝas labori je tiu celo, tiam, spite al via nesperteco, vi estas bonaj Esperantistoj.

Vera esperantisto estas ankaŭ altruisto. Lia vivo estas sindonema, ne egoista. Li deziras interrilatojn kun siaj kunhomoj por ke li pli bone servu ilin, kaj ke ili konu lian simpatian, bondeziron, amon; plue, li estas konstanta malamiko de la militado.

La Esperantemigo de la mondo estas ĉefe afero de kuraĝo. Multaj personoj timas aliĝi al nova kaŭzo, aŭ almenaŭ ĝin aliĝi malkaŝe. Ĉiu Nikodemus deziras koni la veron, sed li serĉas ĝin nur nokte, por ke li mem ne suferu, ne estu mokata. Tio, kion Esperanto bezonas, estas, ne tiom da malkuraĝaj, silentaj amikoj, sed multmemaj pacaj batalantoj, sur kies armilo de fido la sagoj de la malsaĝaj mokuloj malakriĝos.

“Ĝis la bela sonĝo de l' homaro
Por eterna ben' efektiviĝos.”

Konservante ĉi tiujn pensojn, ni iru nian vojon ne nur trankvile, sed ankaŭ kuraĝe, konstante, kaj ne haltigante. Ni ne forgesu ke laboroj, penoj, kaj klopodoj atendas nin, sed ankaŭ ni memoru ke preter tiuj estas premioj por la bonfarontoj. Ni tenadu en niaj mensoj La Vojon, kiel nia Majstro pentris ĝin.

—El Amerika Esperantisto
Aŭgusto 1912

LA VOJO

de L. L. Zamenhof

Tra densa mallumo briletas la celo
Al kiu kuraĝe ni iras:
Simile al stelo en nokta ĉielo,
Al ni la direkton ĝi diras;
Kaj nin ne timigas la noktaj fantomoj,
Nek batoj de l' sorto, nek mokoĵ de l' homoj
Ĉar klara, kaj rekta, kaj tre difinita
Ĝi estas la voj' elektita.

Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante
Ni iru la Vojon celitan:
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' Espero, l' obstino, kaj la pacienco:
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

Ni semas kaj semas—neniam laciĝas,
Pri l' tempoj estontaj pensante;
Cent semoj perdiĝas; mil semoj perdiĝas;
Ni semas, kaj semas konstante.
“Ho, ĉesu!” mokante la homoj admonas.
“Ne ĉesu! ne ĉesu!” en kor' al ni sonas;
“Obstine antaŭen! la nepoj vin benos
Se vi paciencie eltenos.”

Se longa sekeco, aŭ ventoj subitaj,
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras.
Ne mortos jam nia bravega anaro;
Ĝin jam ne timigas la vento nek staro;
Obstine ĝi paŝas, pruvita, hardita,
Al cel' unu fojon signita.

Nur rekte, kuraĝe, kaj ne flankiĝante
Ni iru la Vojon celitan:
Eĉ guto malgranda, konstante frapante,
Traboras la monton granitan.
L' Espero, l' obstino, kaj la pacienco:
Jen estas la signoj, per kies potenco
Ni, paŝo post paŝo, post longa laboro,
Atingos la celon en gloro.

THE WAY

by L. L. Zamenhof

translated by D. O. S. Lowell

Lo, through the thick darkness the goal ever gleameth
Toward which we so boldly are tending;
Like a star, in the firmament shining, it seemeth
To lighten the way we are wending:
The phantoms of darkness us never can frighten;
Mischances and mockeries serve but to brighten
The Way, straight and definite, we are pursuing,
And aid in the work we are doing.

Straightforward, with courage, nor veering nor stopping,
Pursue we this Way of our own:
Ne'er faileth the water, by dropping and dropping,
To wear through a mountain of stone:
For Hope, and Persistence, and Patience together
Are watchwords efficient in all kinds of weather;
So, step after step—such is ever the story—
We'll come to the goal of our glory.

We scatter the seed; and the hope that we cherish
E'er brightens the way we are going;
Though seeds by the hundred and thousand may perish,
We never will cease from the sowing.
“Enough!” cry the mocking Philistines who meet us.
“No, never enough, till the whole world shall greet us!
Then onward, and onward, and onward forever,
Till posterity bless our endeavor!”

Though drought and though tempest together may scatter,
Yea, wither the leaves on our trees,—
We thank the rough storm that doth bruise them and batter,
For strength thus they gain by degrees.
Our faithful co-workers no effort shall slacken,
Though cyclones assail us, our progress to backen;
Persistently onward—tried, proven, devoted—
They march to the goal they have noted.

Straightforward, with courage, nor veering nor stopping,
Pursue we this Way of our own:
Ne'er faileth the water, by dropping and dropping,
To wear through a mountain of stone:
For Hope, and Persistence, and Patience together
Are watchwords efficient in all kinds of weather;
So, step after step—such is ever the story—
We'll come to the goal of our glory.

—*Amerika Esperantisto*
August, 1912

PLENA GRAMATIKO DE ESPERANTO... ...POST CENT JAROJ

de Carlos I. de Jesus

Jen la 16-regula Fundamenta Gramatiko, ŝanĝita, adaptita kaj konformigita al la evoluo de nia lingvo dum cent jaroj. Esperantistoj ne devas senkuraĝiĝi, ĉar oni povas daŭre aserti Esperanton simpla kaj senescepta, malgraŭ la negativaj opinioj de malbonintencaj grumbluloj.

Regulo 1—Artikolo nedifinita ne devus ekzisti. Kelkaj el ni iafoje tamen uzas “unu, ia, iu, certa”, ktp., depende de la personaj preferoj. La deziro obei tiun ĉi regulon estas tiel forta ĉe ni, ke ni ofte ellasas la numeralon “unu”, kvazaŭ ĝi estus artikolo nedifinita. Ekz.: “Hieraŭ mi perdis frankon, ne du.”

Ekzistas nur artikolo difinita (la), egala por ĉiuj seksoj, kazoj kaj nombroj. Ĉar la uzo de la artikolo estas tia sama, kiel en la aliaj lingvoj, oni kelkajn fojojn vidas frazojn ĉi-tipajn: “Post la Aprilo, prezidanto de U.E.A. vizitos la Kanadon.”

Regulo 2—*Preskaŭ* ĉiuj substantivoj havas la finiĝon *o*. Escepto estas la nomoj de virinaj, pardonu, virinoj, kiuj havas la finiĝon *a*: Maria, Eliza, ktp. Ŝajnas, ke estus nedigne al la eŭropaj sinjorinoj, se iliaj nomoj finiĝus je *o*, kiel tiu de la krudaj viroj. Aŭ eble la sinjorinoj ne volas esti vulgaraj substantivoj. Kion neniu ankoraŭ solvis, tio estas, kiel pluformi adjektivon el virina nomo. Aŭ tiel: “Mariaa”, “Elizaa”; aŭ tiel: “Marioa”, “Elizoa”. Oni atendas sugestojn! Pluraj teoriuloj volas pravigi tian esperantofuŝan escepton dirante, ke “Antonia” estas mallongigo de “Antonia ino”, sed, Gesinjoroj, se, en Esperanto, la respektplenaj virinoj estas nuraj inoj, ĉu eksteruloj ne povus diskrii pri nia kara lingvo, ke ĝi estas insulta al la pli bela duono de la homaro?

Regulo 3—La adjektivo kaj la virinomoj finiĝas per *a*. Estas fakto, ke la komparativo estas farata per la vorto “pli” kaj la superlativo per “plej”. Tamen, nur komencantoj estas permesataj diri: “Ŝi estas pli Maria ol mia fratino”; aŭ: “Mia fratino estas la plej Maria el ĉiuj”.

Regulo 4—Ŝajnas, ke nenio estas aldonenda al la regulo 4-a escepte, ke oni ne prononcu “miljono” anstataŭ “miliono”.

Regulo 5—Pronomoj personaj: mi, vi, li, ŝi, ĝi, si, ni, vi, ili, iŝi, iĝi, oni. Estas facile komprenebla tio, ke “ili” estas la pluralo de “li”, “iŝi” la pluralo de “ŝi”, kaj “iĝi” la pluralo de “ĝi”. Kiam oni bezonas pronomon kun la malnova senco de “ili” (pluralo de “li”, “ŝi” kaj “ĝi” samtempe), oni povos libera uzi la belan neologismon “iliŝiĝi”. Estas vero, ke tiu ĉi arta elcerbaĵeto ŝajnas plie verbo ol pronomo, sed valoras tian sensignifan malmultaĵon oferi en la nomo de la evoluo.

Kiam oni parolas pri homaj estuloj, kies seksoj oni ne konas aŭ ne volas mencii (persono, infano, homo, k.a.), ni ĉiuj agnoskas, ke la uzo de la pronomo “ĝi” estas degradiga. Kelkaj el ni uzas “li” en ties neŭtra senco, sed aliaj el ni (precipe virinoj apartenantaj al la Virinliberiga Movado) opone asertas, ke tio estas vira ŝovinismo. Tial, tiuj ĉi lastaj proponas kaj mem kuraĝe uzas “ŝili”. Oni ne bone vidas, kial “ŝili” kaj ne “liŝi”. Tamen, onidiroj diskuras, ke pluraj el ni (precipe viroj apartenantaj al la Virŝovinisma Movado) time protestas kontraŭ

“ŝili”, ĉar ĝi mencias virinojn unualoke. Kiuj pravos kaj kiuj malpravos? Oni tute ne scias, kaj tial estas konsilinde, ke ĉiu konscia esperantistino aŭ esperantisto elelektu mem, neniam forgesante pri la reago de sia edzo aŭ edzino. Unu afero, tamen, estas absolute malpermesata, kaj ĝi estas uzi “ŝili” kaj “liŝi” kiel verbojn. “Mi ŝilas” aŭ “vi liŝas” estas nefundamentaj esprimoj.

La pronomoj posedaj “ilia, iŝia, iĝia, iliŝiĝia, ŝilia aŭ liŝia” estas bonvenige allasataj kaj uzendaj.

Regulo 6—La regulo pri la verboj estas la sama escepte, ke pri la pasivo la geesperantistoj estas dividitaj en du ne reinterkonsentebajn kampojn. Sed tion ni ĉiuj jam delongege bone scias. Ja, tiel la itistoj kiel la atistoj (kiaj humuraj alnomoj!) unue emociigis nin profunde, kaj poste ridigis nin kore per siaj amuzaj argumentoj, laŭ la Zamenhofa uzado unuflanke, kaj laŭ la Fundamento aliflanke. Ĉu iu komprenas la diferencon?

Regulo 7—la regulo pri la adverbo ne multe ŝanĝiĝis. Nur, en kelkaj okazoj, la adverbo alivestiĝas, kiel senhonta adjektivo. Fakte, diversaj aglokulaj samideanoj emas konscie skribi ekzemple: “Vojaĝi per Esperanto estas agrabla”, aŭ “Estas bona, ke vi lernis Esperanton”, aŭ “Hodiaŭ estas malvarma”. Ili senkulpe pravigas sin per tio, ke la tri suprajn frazojn oni povas supozi mallongigoj de: “Vojaĝi per Esperanto estas agrabla (okupo)”, “Estas bona (tio), ke vi lernis Esperanton”, “Hodiaŭ estas malvarma (vetero)”. Bone elpensita ruzajo, ĉu ne?

Laŭ tiu ĉi mallongigado, oni devus ŝanĝi, en estontaj eldonoj de la Fundamento de Esperanto, la konatan frazon “Resti kun leono estas danĝere” al “Resti kun leono estas danĝera”, kaj en la sama maniero, ĉiujn aliajn samspecajn ĝenajn adverbojn al pli simpatiaj adjektivoj.

Regulo 8—Ĉiuj prepozicioj per si mem postulas la nominativon. Kutimaj plendemuloj povas pensi, ke la akuzativoj, kiujn ili eventuale vidas kaj aŭdas post “anstataŭ” kaj “krom”, kaj ankaŭ kelkfoje post “ĉirkaŭ”, “po”, “super”, “ĝis” kaj “inter” estas esceptoj. Tamen, ne. La Movado estas bonŝanca, ke Esperanto ankoraŭ ne evoluis ĝis la punkto de ĝenerala esceptado.

Regulo 9—Ĉiu vorto estas legata, kiel ĝi estas skribita. Geesperantistoj, tamen, elvolvis esceptojn ĉi-rilate. Jen kelkaj:

a)—La vokaloj *e* kaj *o* emas “surdiĝi”, kiam en senakcentaj silaboj: Esperanto.

b)—En la kombinaĵo KZ, la K estas klare prononcata, kiel G: egzisti, egzemplo, k.a.

c)—La B en la kombinaĵo BS estas klare prononcata, kiel P: apsoluta, apsolvi, k.a.

ĉ)—La kombinaĵo NJ estas prononcata, kiel unu sola konsonanto, kies sono ne ekzistas en Esperanto: Siŝoro, Buloño.

d)—Duoblaj konsonantoj ne estas prononcataj duoble, kiel ili devus esti. Geesperantistoj estas tro mallaboremaj por korekte prononci ELLASI, SUBBRAKE, FINNO. Anstataŭe ili mole diras ELASI,

SUBRAKE, FINO.

Se vi ne kredas, nur vizitu Universalan Kongreson de Esperanto, kaj malfermorele observu, pardonu, observu.

Regulo 10—La akcento estas ĉiam sur la antaŭlasta silabo, escepte ĉe, kompreneble, la unusilabaj vortoj. Alia bona escepto estas la eliziataj substantivoj, ĉe kiuj la akcento estas sur la lasta silabo: profesor'. Ĉi tiun escepton ĉiu esperantisto rigore sekvas. Neniaj plendoj.

Regulo 11—Neniaj esceptoj de tiu ĉi regulo estas ankoraŭ konataj. La esprimoj "ĉiu tage", "skribo tablo" kaj similspecaj, kiujn oni iafaje trovas en skribaĵoj de komencantoj, estas simplaj fuŝoj.

Regulo 12—Ĉe alia nea vorto la vorto "ne" estas forlasata. Kompreneble, ni ĉiuj korekte uzas la esprimon "ne povi ne...i". Kion ĉi tiu regulo forigas, tio estas frazaĉoj ĉi-specaj: "Mi neniam ne vidis lin".

Regulo 13—Por montri direkton, la vortoj ricevas la finiĝon de la akuzativo. Kelkajn fojojn ni tro uzas ĉi tiun regulon: "Vojaĝi al Londonon; bicikli ĝis Parizon; iri returnen", k.s. Komencantoj ordinare maltro uzas ĝin: "Li eniris en la ĉambro".

Regulo 14—Preskaŭ ĉiu prepozicio havas pli-ol-unu signifojn. Plej ofte ni ĝuste elektas ilin, sed iujn fojojn ni konfuziĝas. Estas kompreneble, ke ni ĉiam povas nin turni al "je", sed ne multaj el ni ĝin ŝatas. Tial ni sporade ŝvebas en la aero.

Regulo 15—Ĝi estas probable la plej bona el ĉiuj 16 reguloj. Ni trovas en tiu senfunda provizejo grandan amason de la tiel nomataj fremdaj vortoj, kiuj, laŭe al tiu ĉi regulo, rajte apartenas al Esperanto. Ili ne estas aparte lernendaj, ĉar ni jam antaŭe konas ilian formon kaj signifon. Ili estas precipe multhelpaj al ni, gesamideanoj el Afriko kaj Azio. Ni nur devas unue lerni funde aŭ la nederlandan, aŭ la germanan, aŭ la francan, aŭ ian alian eŭropan lingvon. Post tia malgrandega klopodo, niaj vortaraj problemoj en Esperanto forvapiĝas. Alimaniere, kiel ni povus memorteni vortojn, kiel "prestidigitatoro", "teleaŭtografi", "mnemotekniko" kaj multajn aliajn?

Regulo 16 kaj lasta—La fina vokalo de la substantivo kaj de la artikolo povas esti forlasata kaj anstataŭata de apostrofo. Komforta escepto el tiu ĉi regulo estas la elizio de la *e* en la esprimo "dank' al". Malgraŭ la malpermeso elizii la *a* de la adjektivoj, ni tamen povas kuraĝe ĝin efektiviĝi, kondiĉe ke ni estu ruzaj kaj tion faru sufiĉe kaŝe. Nur rigardu al la vortoj "dikfingro", "junedzo", "sekvinbero", k.s. Kiel ni ĉiuj scias, poetoj ĝuas certajn lingvajn privilegiojn, kiujn la resto el ni ne estas permesata disponi. Ili vaste profitas el tiu ĉi kaŝa elizio de la *a*, eble trouzas ĝin iafaje.

Nun, pri la permesata forlaso de la *o* substantiva, niaj poetoj estas veraj asoj en tiu ĉi lerteco. Kiam ni legas certajn poemojn, la apostrofoj enviciĝas tiel kunpreme, ke ni pensas, ĉu eble, dum la aŭtoroj ilin verkis, ia trafenestra venteto forblovis la paperon sur la korton, kaj ia malsateganta kokino enbekigis kaj forglutis la finajn rondajn *o*-etojn, misprenante ilin por milieroj. Johán Valano bedaŭrinde profitas plene la regulon pri elizio, ĉar li montras en siaj noveloj specialan talenton por oportune, taŭgaloke kaj ĝustamezure elizii la substantivon. Ni devas do ne imiti lin, sed kelkajn el niaj poetoj, kiuj transformus la vulgaran frazon "Ĉe la pordo de la domo la alta soldato amindumas kun

la bela fraŭlino", en la jenan ĉefverketon "Ĉe l' pord' de l' dom' l' altsoldat' amindumas kun l' belfraŭlin'".

Rimarko—La tendenco en la evoluo videbla favora al la eŭropaj lingvoj estas nur ŝajna, ĉar Esperanto ne ĉesis esti neŭtrale internacia. Diskriminacio kontraŭ la neeŭropaj idiomoj estus kontraŭesperantisma, kaj estus honte, se nia gramatiko tion allasus.

Fina Noto—La plej bona pruvo, ke Esperanto estas efektive la kvintesenco de la lingvoj laŭ reguleco kaj senescepteco, estas ke ni, esperantistoj, pasie klopodadis ĉiam fuŝe saboti kaj deformi ĝin, kaj tamen, dum unu tuta jarcento da mispenado, ni plene malsukcesis. Ni kapablis, per niaj atencoj, nur skrapeti la brilnan surfacon kaj ĝin obtuzigi. Ni fidele daŭrigu nian laboron "naturigi" nian lingvon kaj konformigi ĝin al la haladzaj hazardoj kaj fiaosaj esceptoj de la naciaj idiomoj kaj, probable, post alia jarcento, ni estos atingintaj nian celon. Tiam, oni povos ĝin piedfrapi en la rubejon, kie agoniadas la "naturecaj" Okcidentalo kaj Interlingua.

BE STILL MY HEART

by L. L. Zamenhof

Be still, my heart, don't beat with such commotion,
Out of my breast, don't leap up and away!
I can no longer hold back my emotion,
Be still, my heart!

Be still, my heart! After a long, long labor,
Will I not win, in a deciding hour!
Enough! Allay that beat, be of good favor,
Be still, my heart!

Translation: Sylvia B. Bogdan

NEKAPTEBLA

de Ella Gibson

Sentojn pulsantajn
En la korsango,
Poetoj volus
Enversigi nete.

Ĉu oni povas
El la sunbrilo,
Lumdiamantojn
Ekkapti fiŝrete?

El Norda Prismo, 1969(2)

LA REĜO DE L' MARO

de Steven A. Gustafson

Staras dek-du junulinoj, honore elektitaj el ĉiuj idinoj de ilia lando, ligitaj al palisoj kverkaj sur la strando, fronte al la tajdo alvenonta.

Retoj sekiĝas sur skafaldo ligna. Mevoj—la ratoj aeraj—kombas la plaĝon, serĉantaj forĵetaĵojn de la kaptajo hodiaŭa. Linio kanelaja, ĉiamŝanĝiĝanta, signas la limon inter la tero kaj la tereno de la Reĝo de la Maro.

Kvankam la manoj de la junulinoj estas ligitaj malantaŭ la palisoj, kaj la ŝnuroj ekjukas, ili ne pensas pri la malkomforteco. Ili pensas pri tio, kion la estroj de ilia lando diris, pri la Reĝo de l' Maro, kiun ili renkontos, kaj pri la mirindaĵoj por ili estontaj. Plaŭdas l' akvo ĉe iliaj piedoj.

La bleko de l' maro, la teda siblo de l' ondoj mildaj, neniam finiĝas, do minime rimarkatiĝas; sole ĝi pekas kontraŭ la sensonaĵo; la maro, la junulinoj, kaj la mevoj estas la solaj vivantoj videblaj. Dum l' akvo leviĝas ĝis femuro, revas ili pri la trezoroj oraj kaj arĝentaj de la Reĝo de l' Maro, abundo rikoltita de la naviguloj kompatindaj, veteraĉe pereintaj. Liaj muroj, amasigitaj el ŝtono kaj fuko viva, mirinde leviĝas alte, kaj la volbo estas nebula kvazaŭ katedralo incensoplena; tie gardas la Reĝo de l' Maro siajn kestojn, da oro hispana aŭ perloj barokaj plenajn.

Kaj kio pri amantoj iliaj? Ĉu ili kaŝiĝas malantaŭe, kaj rigardas kiel la akvo diafanigas la bluzojn? Ĉu fiera estus li, vidi sian amantinon promenanta tra la kanjonoj plej profundaj de l' marfundo, ornamata de la insignaro ora kaj verda de la Reĝo de l' Maro, ŝia promeno heroldata de nigraj kaj kateskaj fiŝoj kiuj portas lucernojn ĉe la finoj de drataj nezoj?

Kiu scias, pri kio ili pensis, kiam la akvoj fine ĉirkaŭis kaj superis iliajn kapojn? Sole nur ni scias, ke haro ilia supre ŝvelis, kvazaŭ bukedoj de aŭreoloj, kiam ili ekvojaĝis por renkonti la Reĝon de l' Maro.

LA REĜIDINO DE REVOJ

de Ernest Dowson

elangligis Steven A. Gustafson

Kompatinda reĝidino legenda! En ŝia turo ebura, la liberigulo pensis, ke ŝi atendas lin.

Ĉar unufoje—reve—li vidis, kvazaŭ liliflorojn, la lagojn bluajn, kiuj estis ŝiaj okuloj, kiuj ŝajnis esti envolvataj en implikado de ŝiaj haroj oraj.

Kaj li serĉis ŝin tra la sennombraj serpentumaĵoj de ŝia arbaro dum multaj lunaĵoj; li serĉis tra la marĉejoj, ŝparinte nek sian ĉevalon, nek sian glavegon. Dum la serĉado li mortigis kelkajn fiaĉulajn sorĉistojn kaj multajn siajn amikojn; do, je la fino de lia vojaĝo, lia brila glavego rustiĝis kaj lia beleco malpuriĝis kote. Siajn ĉevalojn li ne ŝparis; iliaj ostoj malantaŭe signis spuron blankan tra la serpentumaĵoj de l' arbaro. Tamen li portis

ĉian elaçetaĵon, ĉiujn kostaĵojn kaj graciaĵojn en kesto cipresa: perlojn masivajn kaj ametistojn kaj silkaĵojn Samarkandanajn, pendborderon Venecian, bonegajn tapetojn Tiriajn. Ĉiujn li portis al la pordoj de ŝia turo ebura.

Kompatinda reĝidino legenda.

Ĉar li ne liberigis ŝin, kaj la pordisto sensprita ŝtelis lian trezoron kaj rompis duone lian glavegon makulitan.

Kaj kiu scias, kie li vagas, senĉevala kaj senarmila, tra la marĉejoj kaj la mallumaj serpentumaĵoj de ŝia arbaro sub la nokto senluna, revanta pri tiuj lilifloroj, ŝiaj okuloj? Kiu scias? Ĉar la pordisto sensprita nenion diras; li estas obtuza mense.

Sed iu diras, ke ŝi ne volis liberiĝi, kaj tiuj lilifloroj, ŝiaj okuloj, estas flako stagna kaj malluma, kaj ŝiaj haroj belegaj kaj oraj nur estis tiel longaj, kiel ili etendiĝis al ŝia fina malfermaĵo.

Iu diras, tamen, ke ŝia turo ne estas ebura kaj ŝi eĉ estas nek virta, nek reĝida.

BETTA

de Steven A. Gustafson

Mia animo estas kvazaŭ siama batalfiŝo, kiu kaptatiĝis en marĉo malluma cipresa, de homoj kuraĝaj, homoj kiuj konas febrojn strangajn kaj tribojn kanibalajn.

Nun mi sole rondiras en fiŝujo dek-kvin centimetra sur breto en butiko dorlotbesta.

Mi suĉas vezikojn de la surfaco akva.

Mi estas vendota.

Tamen, kiam mi rondiras en mia baloneto vitra, mi sorĉiĝas; mia spektado al mi montras multajn diversajn bestojn, eĉ pli kolore vestitajn ol mi. Ili rigardadas min, sed ili estas sub mi, kaj en mia vitra fermaĵo, mi estas sekura. Ili ĉeestas kaj forestas laŭ plano malkonata; sed kun mi, hieraŭ estas hodiaŭ estas morgaŭ.

Mi elmontras mian aŭroron senutilan naĝilan nur por minaci mian reflekon en spegulo.

Mi okaze deziras la ĉeson de mia aera suĉado, por flosi inverse; sed okaze ĉi tiu emocio forpasas.

LA KURACADO

de Steven A. Gustafson

Ruĝa kaj blanka stango staras ekster la metiejo, emblemo de profesio klera. Ruĝo estas pro sango, kaj blanko estas pro bandaĝoj.

Nun mi sidiĝas inter la aliaj viktimoj francapoksaj kaj la sinjoroj kiuj atendas la razilon, kaj mi aŭskultas iun ebruilon kiu ludas la bandoron. Kaj nun mi sidas en la seĝo de la kuracisto.

Post konsulti siajn librojn horoskopajn, la klera kirurgo ekprenas siajn pinĉiletojn, kaj iun bokalon kiu surhavas la vortojn "Hirudo Medicinalis". Interne, li trovas hirudojn, pli dikajn ol fingro de bebo, kaj li metas ilin sur mian haŭton.

Unu sur la kapon, laŭ Jupitero;

Du sur la brakojn, laŭ la Ĝemeloj;

Tri sur la ingvenon, laŭ la luno en Skorpio.

LA UNUĈEVAL-KALEŜETO

de Oliver Wendell Holmes

Tradukis Mack Dougherty

Rimeneĝo: tre larĝa bisona dikhaŭto;
La kotŝmirilo, la kofro, kapuĉo:
Malmola ledaĉo tanista el puto.
La Diakono dekane dediĉas,
Kaj: "Jen!" li asertas feliĉe, "Sufiĉas!"

'Sufiĉas'? Mi nepre certigas al vi,
Estis vera miraklo, neniel malpli!
Ĉevalidoj plenkreskis; jen grizis la barb';
Diakono kaj -ino entombiĝis sub arb';
Idoj, genepoj—do kien? Ĉe karb'.
Sed pri la kaleŝ'? Ne paliĝis eĉ farb';
Freŝa kiel je Lisbon-Tertrem-tago, ĝi!

Milokcent ekvenis kaj jen, sendifekta,
Ĝi trovis la pastran majstraĵon tre rekta.
Milokcent kaj deko la jaro estiĝis;
'Hansum keridĝo', ĝi tiam nomiĝis.
Milokcent kaj dudek sekve alvenis;
Kiel kutime, la vivo ebenis.
Tridek, kaj kvardek, kaj je la finfin',
Alŝtelis la kvindek, kaj KVINDEK KVIN!

Nenio valora, neniu altranga
Vekas je sia centjaro, palvanga,
Sen ke li aspektas, kaj sentas sin, stranga.
Nenio sukcese retenas sur tero
Junecon, escepte la arbo kaj vero.
(Nu, ĉi moralaj' konatiĝas mondlarĝe;
Alprenu, bonvole—ĝi kostas ne ŝarĝe.)

La unuan, novembre—"La Tago Tertrema"—
La grandaĝa kaleŝo estiĝis vibrema.
Ĝenerala odoro iome ŝimema,
Sed—lasu min diri—nenio sistema.
Ne eblis—ĉar la diakona batalo
Fortikigis egale en ĉiu detalo:
Por ekkadukiĝi ne restis kialo.
Ĉar risorto daŭradis samkiel transtrabo,
Kaj akso kaj planko samkiel la nabo,
Kaj same la sojlo, idente la planko,
La ŝraŭbo, la bolto, kaj ankaŭ tirstango.
Nek malpli, nek pli estis ŝtupa metal',
Ĉiu parto samfortis, antaŭo kaj mal'—
De kapuĉo ĝis rado, ĝis fina falbal'.
Tamen—tia *tutaĵo*, neniel dubita,
Ja estos—post nur unu hor'—eluzita!

La unuan, novembre—kvindeko kaj kvin!
Ĉimatene veturas la pastro kaj -in'.
"Tuj alflankenigu vi, ĉiu knabeto!"
Jen ruliĝas la unuĉeval-kaleŝeto
Tirata de rat-vosta bej' kun diskreto.
Hop! diris la pastro, kaj ili ekhopsis.
Li, verkante prelegon dum bejo galopis,
Progresis ĝis 'kvine', kaj (mi parafrasas)
Diris "Kio, je nomo de ... Dio okazas!"
Subite la besto ekhaltis pro timo
Sur eta montet', ĉe preĝeja proksimo.
Unue, tremeto—kaj sekve, frakas'!
Kaj la pastro sin trovis en grand-embaras'—
Ili sidis, tre solaj, apud la teras'.
Estis naŭ kaj duon', laŭ horloĝa sonoro.
Ĝuste la hor' de tertrem-rememoro!

Ĉu vi scas do, kion la pastro konstatis
Stariĝinte? Li vidis ke ja rezultatis
Polviĝo de ĉiu kaleŝa peceto,
Kušanta surgrunde kiel silueto!
Ne parton post peco sed laŭ la metodo
De granda bobelo je sia esplodo.
Kompreneble vi scias, kiel manifestis
Tia fino: la povra kaleŝ' ... ekmalestis!

La unuĉeval-kaleŝeta detru'.
Logike.

Kapablas mi diri ne plu.

'BEAU'

de Loren Eiseley

tradukis Mack Dougherty

Estas nun mortfora, 'Beau',
tiu nigra pudelego
kiu, je miaj vizitoj ĉe liaj majstroj,
ĉiam flirtigis la flavan manĝobovlon
ĝoje ĉe la pordo bojante
bonvenon
aŭ kuŝi maten-atende ĉe mia litflanko.

Hodiaŭ kontraŭ la verandon
lia defiadanto la sciureto
kiu frenezigadis tiun
Beau

fajfjetis disputemon desur la muro
sed eĥis nur silento.

Miapense eĉ la sciureto konfuziĝis.
Ili longe rivaladis inter si kaj nun
silenton jam
falas.

Lilio moke kapjesis surtipe
kaj mi
piedotrenis al la ĉambro kie 'Beau'
ne plu trifoje sin ĉirkaŭturnos
kaj kuŝos pacience suspiranta
dum mia verkado.

Mi ne estas filozofa. Nur scias mi
tion ke
ĉio bona ĉeson havas.
Espere tiu 'Beau'
jam foriris sen tion lerninta.

Hieraŭ lia lud-kunulineto de
najbare
venis lanto-paŝe, samveninta oftantaŭe.
Kiel tion ĉi konigi al bestoj:
ke post ia tempo
neniu postrestas; nek ombroj,
nek voĉoj, nek odoroj.

Oni eĉ ne povas bildon montri.
Ŝi forvagas sendire laŭ la pado.
Ŝi ne komprenas ekmalestojn de la
mondo.
Rigardante la tapiŝeton solecan ĉe mia
lito,
nek komprenas mi.

FIERO KAJ ANTAŬJUĜO

de Jane Austen

elangligis Rob Hardy

Ĉapitro Unu

Estas veraĵo universale akceptita, ke needziĝinta viro kiu posedas grandan riĉaĵon, necese sentas la mankon de edzino.

Kiel ajn malmulte oni scias la sentojn aŭ opiniojn de tia viro kiam li unue eniras najbaraĵon, ĉi tiu veraĵo estas tiel firme fiksita en la mensoj de la ĉirkaŭaj familioj, ke li estas rigardata kiel la rajta propraĵo de unu aŭ la alia el iliaj filinoj.

“Mia kara S-ro Bennet,” diris lia edzino al li iam. “Ĉu vi aŭdis, ke Netherfield Parko fine estas luita?”

S-ro Bennet respondis, ke ne.

“Sed ĝi ja estas,” rediris lia edzino: “Ĉar S-ino Long ĵus venis ĉi tien, kaj ŝi rakontis al mi ĉion pri tio.”

S-ro Bennet neniel respondis.

“Ĉu vi ne volas informiĝi pri kiu luis ĝin?” kriis lia edzino senpacience.

“Vi volas informi min, kaj mi ne havas kontraŭargumenton pri tio.”

Ĉi tio estis sufiĉa invito.

“Nu, mia kara, vi devas scii, ke S-ino Long diras, ke juna viro kun granda riĉaĵo el la nordo de Anglujo luis Netherfield; ke li alvenis lundon per veturileto kun kvar ĉevaloj por vidi la bienon, kaj ĝi tiel ravis lin, ke li tuj faris kontrakton kun S-ro Morris; ke li ekokupos ĝin antaŭ la festo de Sankta Miĉaelo, kaj kelkaj el liaj servistoj estos en la domo antaŭ la fino de la venonta semajno.”

“Kio estas lia nomo?”

“Bingley.”

“Ĉu li estas edzo aŭ fraŭlo?”

“Ho! Fraŭlo, mia kara, certege! Needziĝinta viro, kun granda riĉaĵo; kvar aŭ kvin miloj ĉiujare. Kia bonegaĵo por niaj filinoj!”

“Kiel? Kiel tio povas tuŝi ilin?”

“Mia kara S-ro Bennet,” respondis lia edzino, “kiel vi povas esti tiel laciga! Vi certe scias, ke mi pensas pri lia edziĝo al unu el ili.”

“Ĉu tio estas la celo pro kiu li transloĝiĝis?”

“Celo? Sensaĝaĵo, kiel vi povas diri tion? Sed estas tre verŝajne, ke li eble enamiĝos al unu el ili, kaj tial vi devos tuj viziti lin post kiam li alvenos.”

“Mi vidas nenian kaŭzon por tio. Vi kaj la knabinoj povos iri, aŭ vi povos sendi ilin sen vi, kio estos eĉ plibona, ĉar vi estas tiel bela kiel iu el ili, do S-ro Bingley eble ŝatos vin plej alte ol ĉiujn en la bando.”

“Mia kara, vi flatas min. Mi certe havis mian porcion da beleco, sed mi ne pretendas nun esti io eksterordinara. Kiam virino havas kvin plenkreskajn filinojn, ŝi devas forlasi pensojn

pri sia propra beleco.”

“Tiaokaze, virino ne ofte havas multe da beleco pripensinda.”

“Sed, mia kara, vi ja devos iri por vidi S-ron Bingley kiam li venos en la najbaraĵon.”

“Tio estas pli ol mi prenos sur min, mi certigas vin.”

“Sed konsideru viajn filinojn. Nur pensu pri kia mastraĵo estus tio por unu el ili. Sir William Lucas kaj Lady Lucas jam decidis iri, nur pro tio, ĉar vi scias, ke kutime ili ne vizitas novealvenintojn. Vi ja devos iri. Ĉar ni neniam povos viziti lin se vi ne vizitis.”

“Vi estas certe tro skrupula. Mi permesas al mi antaŭdiri, ke S-ro Bingley ĝojos vidi vin; kaj mi sendos kelkajn liniojn per vi por certigi lin pri mia elkora konsento pri lia edziniĝo de iu ajn el la knabinoj kiun li elektos; kvankam mi devos enmeti rekomendan noton pri mia eta Lizzy.”

“Mi deziras, ke vi faru nenion ajn tiaspecan. Lizzy estas tute neniel pli bona ol la aliaj; kaj mi estas certa, ke ŝi estas nek duone tiel bela kiel Jane, nek duone tiel bonhumora kiel Lydia. Sed vi ĉiam donas al ŝi la preferon.”

“Neniu el ili havas multe da io kio rekomendas ŝin,” li respondis; “ili ĉiuj estas naivegaj kaj nesciantaj, similaj al aliaj knabinoj; sed Lizzy havas iomete pli da spriteco ol ŝiaj fratinoj.”

“S-ro Bennet, kiel vi povas tiel insulti viajn proprajn filinojn? Vi ĝuegas turmenti min. Vi ne kompatas miajn mizerajn nervojn.”

“Vi miskomprenas min, mia kara. Mi havas altan estimon pri viaj nervoj. Ili estas miaj malnovaj amikoj. Mi jam aŭdis vin konsidere mencii ilin dum almenaŭ la pasintaj dudek jaroj.”

“Ho, vi ne scias tion kion mi suferas.”

“Sed mi esperas, ke vi travivos ĝin, kaj sufiĉe longe vivos por vidi multajn junajn virojn kun kvar miloj ĉiujare venantajn en la najbaraĵon.”

“Estus senutile al ni, se dudek tiaj venus, ĉar vi ne vizitus ilin.”

“Fidu pri ĉi tio, mia kara, ke kiam dudek venos, mi vizitos ĉiun.”

S-ro Bennet estis tiel stranga miksaĵo de spritemo, sarkasma humoro, memreteniĝo, kaj kaprico, ke la sperto de dudek-tri jaroj ne sufiĉis por kaŭzi, ke lia edzino komprenu lian karakteron. Ŝia menso estis pli facile elmontrebla. Ŝi estis virino kun malgranda kompreno, malmulta informo, kaj malkonstanta temperamento. Kiam ŝi malkontentiĝis, ŝi imagis siajn nervojn malfortaj. La okupado de ŝia vivo estis edzinigi siajn filinojn; ŝiaj konsolaĵoj estis la vizitado kaj la novaĵo.

Capitro Du

S-ro Bennet estis inter la plej fruaj el tiuj kiuj vizitis S-ron Bingley. Li ĉiam intencis viziti lin, kvankam li daŭre certigis sian edzinon, ke li ne iros; kaj ĝis la vespero post kiam la vizito okazis, ŝi havis nenian scion pri ĝi. Ĝi tiam malkaŝiĝis jene. Observinte, ke lia dua filino estas okupita per ornamado de ĉapelo, li subite alparolis ŝin per, "Mi esperas, ke tio plaĉos al S-ro Bingley, Lizzy."

"Ni havas nenian rimedon por scii pri kio plaĉas al S-ro Bingley," diris ŝia patrino indigne, "ĉar ni devas ne viziti lin."

"Sed vi forgesas, panjo," diris Elizabeth, "ke ni renkontos lin ĉe la baloj, kaj ke S-ino Long promesis prezenti lin."

"Mi ne kredas, ke S-ino Long faros ion ajn tiel. Ŝi havas siajn proprajn du nevinon. Ŝi estas egoisma, hipokrita virino, kaj mi havas nenian opinion pri ŝi."

"Ankaŭ mi," diris S-ro Bennet; "kaj mi ĝojas trovi, ke vi ne dependas, ke ŝi servos vin."

S-ino Bennet degnis ne fari respondon; sed ŝi ne povis deteni sin, kaj tial ŝi komencis riproĉi unu el siaj filinoj.

"Ne daŭrigu tusi tiel, Kitty, je la ĉielo! Montru iom da kompatato al miaj nervoj. Vi tute erigas ilin."

"Kitty havas nenian diskretecon pri siaj tusoj," diris ŝia patro; "ŝi tudas malĝustatempe."

"Mi ne tudas por amuzi min," respondis Kitty ĉagrenite.

"Kiam estos via venonta balo, Lizzy?"

"Du semajnojn post morgaŭ."

"Ja, tiel estos," kriis ŝia patrino, "kaj S-ino Long revenos nur la antaŭan tagon; do, estos neeble ke ŝi prezentos lin, ĉar ŝi mem ne konos lin."

"Tiuokaze, mia kara, vi povos havi avantaĝon super via amiko, kaj povos prezenti S-ron Bingley al ŝi."

"Neeble, S-ro Bennet, neeble, kiam mi mem ne konos lin; kiel vi povas tiel turmenti?"

"Mi honoras vian diskretecon. Du semajnoj da konatiĝo estas certe tre mallongaj. Oni ne povas scii, kia vere estas viro post nur du semajnoj. Sed se ni ne devos entrepreni la aferon, iu alia faros tion; kaj fine, S-ino Long kaj ŝiaj nevinoj devos ludi sian hazardon; kaj sekve, ĉar ŝi opinios ke ĝi estas ago de afableco, se vi rifuzos la proponon, mi mem devos fari ĝin."

La knabinoj rigardegis sian patron. S-ino Bennet diris nur, "Sensencaĵo, sensencaĵo!"

"Kion signifas tiu emfaza ekkrio?" li diris. "Ĉu vi opinias, ke la formalajoj pri prezentado, kaj la graveco kiun oni donas al ili, estas sensencaĵo? Mi ne povas tute konsenti kun vi pri tio. Kion vi diras, Mary? Ĉar mi scias ke vi estas juna virino kiu profunde meditadas, kaj legas grandajn librojn, kaj faras eltraĵojn."

Mary deziris diri ion tre saĝan, sed ne sciis kiel.

"Dum Mary alĝustigas siajn pensojn," li daŭrigis, "ni revenu al S-ro Bingley."

"S-ro Bingley naŭzas min," kriis lia edzino.

"Mi bedaŭras aŭdi tion; sed kial vi ne diris tion al mi antaŭe? Semi antaŭe sciis, mi certe ne vizitus lin. Estas tre malbonŝance; sed ĉar mi jam vizitis, nun ni ne povas eskapi la konatiĝon."

La miro de la virinoj estis ĝuste tio kion li deziris; la miro de

S-ino Bennet eble superis la aliajn; kvankam kiam la unua tumulto de ĝojo finiĝis, ŝi komencis anonci, ke estis tio kion ŝi atendis dum la tuta tempo.

"Kiel bona vi estas, mia kara S-ro Bennet! Sed mi sciis, ke mi konvinkos vin fine. Mi fidis, ke vi tro bone amas viajn filinojn por malzorgi pri tia konatiĝo. Nu, kiel tio kontentigas min! Kaj kia bona ŝercaĵo estas, ke vi iris ĉi-matene, kaj diris eĉ ne unu vorton pri tio ĝis nun."

"Nun, Kitty, vi povas tusi tiel multe kiel vi deziras," diris S-ro Bennet; kaj dirinte tion, li eliris la ĉambron, laca de la ravoj de sia edzino.

"Kian bonegan patron vi havas, knabinoj," diris ŝi, post kiam li fermis la pordon. "Mi ne scias kiel vi povos repagi lin pro lia afableco; nek mi, kompreneble. Ĉe nia tempo de la vivo, estas ne tiel afable, mi povas diri al vi, ĉiutage fari novan konatiĝon; sed por vi, ni farus ion ajn. Lydia, mia amato, kvankam vi estas la plej juna, mi supozas, ke S-ro Bingley dancos kun vi dum la venonta balo."

"Ho!" diris Lydia brave. "Mi ne timas; ĉar kvankam mi estas la plej juna, mi estas la plej altkreska."

La cetero de la vespero pasis per konjektado pri kiel frue li siavice vizitos S-ron Bennet, kaj determinado pri kiam ili devus inviti lin al vespermanĝo.

ROZO

Triesto estas rozo
kun dornaj pikantoj
per kiuj unue vundas sin
ĝuste l' enloĝantoj.

Ĝi tamen tiel belas
tiom blankas ĉe la mar'
ke l' emo post foriro
estas revena far'.

Fulvio Muiesan

A ROSE

Trieste is a rose
with thorny spikes...and they
the first to wound themselves are those
who have come there to stay.

It's such a thing of beauty though...
so white beside the sea that when
departing, when you've left to go...
it's apt to bring you back again.

Tradukis Sylvia B. Bogdan

KANTO DE ĜOJOJ

de Walt Whitman

Ho verki la plej jubilan kanton!

Plena de muziko—plena de vireco, virineco, infaneco!

Plena de ordinaraj okupoj—plena de grajno kaj arboj.

Ho por voĉoj de bestoj—Ho por la rapideco kaj ekvilibro de fiŝoj,

Ho por la falo de pluveroj en kanto!

Ho por la sunbrilo kaj movo de ondoj en kanto!

Ho la ĝojo de la spirito—ĝi elkaĝita—ĝi sin ĵetas kiel fulmo!

Ne sufiĉas havi tiun ĉi terglobon aŭ iun tempon.

Mi havos ĉiujn tempojn kaj mil da tergloboj.

Ho la ĝojoj de la inĝeniero iri kun lokomotivo!

Aŭdi la siblon de vaporo, la gajan akran kriegon, la vaporan fajfilon, la ridantan lokomotivon!

Puŝi senreziste kaj forrapidegi en la distancon.

Ho la ĝojplena vagado trans kampojn kaj deklivojn!

La folioj kaj floroj de la plej oftaj trudherboj, la humida kaj freŝa

senmovkvieteco de la arbaro, la delikata odoro de la tero ĉe

tagiĝo, kaj dum la tuta mateno.

Ho la ĝojoj de la ĉevalrajdanto, ina kaj vira!

La selo, la galopo, la premo sur la sidaĵo, la malvarmeta glugo ĉe la oreloj kaj haroj.

Ho la ĝojoj de la pumpisto!

Mi aŭdas la alarmon en noktopleno,

Mi aŭdas sonorilojn, kriegojn! Mi preterpasas la homamason, mi kuras!

La ekvido de la flamoj min frenezigas plezure.

Ho la ĝojo de la vasta elementa simpatio, kiun nur la homa animo kapablas generi kaj eligi per konstantaj kaj senfinaj torentoj.

Ho la ĝojo de la patrino!

La maldormado, la daŭrado, la karega amo, la dolorego, la pacienco cedita vivo.

Ho la ĝojo de pliiĝo, kresko, refortiĝo,

La ĝojo de kvietigo, pacigado, la ĝojo de konkordo kaj harmonio.

Ho reiri al la loko, kie mi naskiĝis,

Aŭskulti la kantojn de birdoj unufoje plu,

Vagi apude la domon kaj farmtenejon kaj ĉirkaŭi la kampojn unufoje plu,

Kaj tra la fruktoarbejo kaj laŭlonge de la malnovaj vojetoj unufoje plu.

Ho ke mi eble maturiĝus apud la golfoj, lagunoj, riveretoj aŭ laŭ la marbordo.

Resti kaj esti okupita tie dum mia vivo.

La sala kaj malseketiga odoro, la marbordo, la salaj malbonherboj malkovritaj ĉe malaltmaro,

La laboro de fiŝkaptistoj, la laboro de la angil- kaj pektenkaptistoj,

Mi venas kun mia pektenrastilo kaj ŝpato, mi venas kun mia angillanco. Ĉu la tajdo malaltmaras? Mi kuniĝas kun la grupo de pektenfosuloj sur la tajdaj ebenaĵoj,

Mi ridas kaj laboras kun ili, mi ŝercas kaj mi laboras kiel vigla junulo;

Vintre mi prenas mian angilkarbon kaj angillancon kaj forpiediras sur glacieron—mi havas malgrandan hakilon por tranĉi truojn en

glacio,

Jen mi bone vestita foriranta gaje aŭ revenanta posttagmeze, Mia kovo de tumultuloj min akompanante, mia kovo de plenkreskaj

kaj parte plenkreskaj knaboj, kiuj amas esti kune kun neniu ajn

tiel bone, kiel ili amas esti kune kun mi,

Tage labori kun mi, nokte dormi kun mi.

Alifojon dum varma vetero, for en boato por levi la omaropotojn,

kie pezaj ŝtonoj ilin subigis. (Mi konas pri la buoj.)

Ho, la dolĉeco de la kvina monato sur la akvo kiel mi remas ĝuste antaŭ la sunleviĝo direkte al la buoj.

Mi levas kline la vimenajn potojn, la malpale verdaj omaroj

Furiozegas per siaj ungoj kiam mi ilin elprenas,

Mi enigas lignajn kejlinojn en la artikojn de iliaj tenaĵiloj,

Mi rias al ĉiu loko unu post alia, tiam reremas al la bordo,

Tie en granda boligilo de bolanta akvo la omaroj boligis ĝis ilia koloro iĝas skarлата.

Alifojne skombroprenante—

Manĝegemaj, frenezaj por la hoko, apud la surfaco, ili ŝajnas plenigi la akvon por mejloj—

Alifojne por rokfiŝoj en Chesapeake golfo fiŝante, mi unu el la brunvizaĝa ŝipanaro—Alifojne trenajante por blufiŝoj for de

Paumanok, mi staris korpfortikigite per la maldekstra piedo sur la boatrando,

Mia dekstra brako elĵetas malproksime volvaĵojn de maldika ŝnuro,

Videblaj ĉirkaŭi mi la rapide turniĝantaj kaj ekiregantaj kvindek kanotoj, miaj kamaradoj.

Ho boati sur riveroj,

La vojaĝo laŭ la St. Laurence, la belega pejzaĝo, la vaporsipoj,

La ŝipoj velveturantaj, la Mil Insuloj, la kelkfojaj flosoj el ligno kaj la flosistoj kun langetendaj svingremiloj,

La kabanaj sur la flosoj, kaj la flue de fumo, kiam ili kuiras vespermanĝon.

(Ho io malutila kaj timega!

Io malproksima de la etaĉa kaj pia vivo!

Io nepruvita! Io en tranco!

Io liberigi de la ankriĝo kaj libere pelanta)

Ho labori en minejoj, aŭ forĝi feron.

Muldanto de fandejo, la fandejo mem, la kruda alta tegmento, la larĝa kaj ombriĝinta spaco,

La fornego, la varmegaj likvaĵoj verŝitaj kaj fluantaj.

Ho repreni la ĝojojn de la soldato!

Senti la ĉeeston de kuraĝa komandisto—senti lian simpatian!

Vidi lian trankvilecon—esti varnigita per la radioj de lia rideto! Iri

al batalo—aŭdi la ludon de klarionoj kaj la batojn de tamburoj!

Aŭdi la krakegojn de artilerioj—vidi la ekbriladojn de la bajonetoj kaj muskedotuboj en la suno! Vidi homojn fali kaj morti senplende!

Gustumi la sovaĝan guston de sango—esti tiel diable!

Ĝojaĉi tiel pri la vundoj kaj mortoj de la malamiko.

Ho la ĝojoj de la balenisto. Ho mi krosas miajn malnovajn krozojn denove!

Mi sentas la movon de la ŝipo sub mi, mi sentas la Atlantikajn brizojn, kiuj min ventumas.

Mi aŭdas denove la krion sendatan suben de la ĉefmasto,

Tie ŝi blovas!

Denove mi saltas supren per la rigilaro de la ŝipo por rigardi kun la aliaj—ni malsupreniras, frenezaj pro ekscitiĝo,
Mi saltas en la mallevititan boaton, ni remas direkte al nia viktimo,
kie ĝi kuŝas,

Ni alproksimiĝas ŝtelece kaj silente, mi vidas la montetan mason,
letargian, sin varmigantan

Mi vidas la parpuniston starantan, mi vidas la armilon ekiregan de
lia forteca brako;

Ho rapide denove malproksimas en la oceanon la vundita baleno
malleviĝanta, kuranta alvente, min trenas,

Denove mi vidas ĝin leviĝanta por spiri, ni remas denove apude, mi
vidas lancon en ĝia flanko, premita, profunde turnita en la vundo,

Denove ni retroiĝas, mi vidas ĝin ree malleviĝi, ĝia vivo rapide
forlasante ĝin.

Kiel ĝi levas ĝin, ŝprucigante sangon, mi vidas, ke ĝi naĝas en
rondoj pli kaj pli mallarĝaj, rapide tranĉante la akvon—mi vidas
ĝin morti.

Ĝi faris unu konvulsian salton en la centron de la rondo,
kaj tiam falas, malvigla en la sanga ŝaŭmo.

Ho la maljuna vireco de mi, mia plej nobla ĝojo el ĉiuj!

Miaj infanoj, kaj nepoj, miaj blankaj haroj kaj barbo,

Mia grandeco, trankvileco, majesteco, el la langa etendo de mia
vivo.

Ho la maturiga ĝojo de virineco! Ho feliĉeco finfine!

Mi havas pli ol okdek jarojn, mi estas la plej respektata patrino,

Kiel klara estas mia menso—kiel ĉiuj homoj altiriĝas al mi!

Kiaj allogoj estas ĉi tiuj, kiaj estas super ĉiu antaŭa? kia freŝeco pli
ol la freŝeco de juneco?

Kia beleco estas ĉi tiu, kiu malsupreniras sur min kaj leviĝas el mi?

Ho la ĝojoj de la oratoro! Pufigi la bruston, ruli la tondron de la
voĉo el la ripoj kaj gorĝo,

La popolon furiozegigi, plorigi, malamigi, dezirigi, kun vi mem,
Gvidi Amerikon—subigi Amerikon per glora lango.

Ho la ĝojo de mia animo, kliniĝanta, ekvilibriĝanta sur ĝi mem,
ricevanta identecon per materiaĵoj kaj amanta ilin, observanta
karakterojn kaj sorbanta ilin,

Mia animo revibriĝas al mi de ili, de vido, aŭdo, tuŝo, rezono,
interrilatado, komparado, memoro, kaj simile,

La reala vivo de miaj sensoj kaj karno superante miajn sensojn kaj
karnon,

Mia korpo farita el materiaj, mia vido farita el miaj materiaj okuloj,
Pruvis al mi ĉi tiun tagon super ĉikano, ke ne estas miaj anturaj
okuloj, kiuj fine vidas,

Ne mia materia korpo, kiu fine amas, marŝas, ridas, krias,
ĉirkaŭpremas, naskigas.

Ho la ĝojo de farmistoj!

La ĝojoj de Ohian', Illinojsian', Viskonsinan', Kanadan', Iovan',
Kansasan', Misurian', Oregonian'!

Leviĝi je ektagiĝo kaj foriri facilmove por labori,

Plugi kampojn aŭtune por semoj semataj vintre,

Plugi kampojn printempe por maizo

Aranĝi fruktoĝardenojn, grefti arbojn, kolekti pomojn aŭtune.

Ho sin lavi per naĝado aŭ en bona loko laŭ bordo,

Plaudigi la akvon! marŝi malevoprofunde, aŭ kuregi nude laŭ la
bordo.

Ho realigi la spacon.

La abundeco de ĉio, ne estas limoj.

Eliĝi kaj esti de la ĉielo, de la suno kaj de la luno kaj flugantaj
nuboj, kiel unu kun ili.

Ho la ĝojo de vireca memeco!

Esti sklava al neniu, cedi al neniu, ne al tirano, konata aŭ ne konata.
Iri per sintenado rekta, paŝo vigla kaj elasta,
Rigardi per trankvila rigardado, aŭ per ekbriliĝanta okulo,
Paroli per plenplena sonora voĉo el larĝa brusto,
Alfronti per via personeco kontraŭ ĉiuj aliaj personecoj de la
mondo.

Ĉu vi konas la bonegajn ĝojojn de juneco?

Ĝojo de karaj kamaradoj kaj de la gaja vorto kaj ridanta vizaĝo?

Ĝojo de la ĝoja lumoradia tago, ĝojo de la rapide spiritaj ludoj?

Ĝojo de dolĉa muziko, ĝojo de lumigita balejo kaj la dancantoj?

Ĝojo de la abunda tagmanĝo, forta drinkorgio kaj drinkado?

Tamen Ho mia animo superega!

Ĉu vi konas pri la ĝojoj de enpenso pensado?

Ĝojoj de la libera kaj soleca koro, la tenera melankolia koro?

Ĝojoj de la piedpromeno sole, la animo kliniĝinta sed fiera, la

sufero kaj la barakto?

La dolorego, la ekstazoj, ĝojoj de seriozaj meditoj, tage kaj nokte?

Ĝojoj de la penso pri morto, la grandaj sferoj Tempo kaj Spaco?

Profetaj ĝojoj de pli bona, pli altegaj idealoj de amo, la dia edzino
kaj la dolĉa, eterna, perfekta kamarado?

Ĝojo ĉiuj, via propra senmorta unu, ĝojoj indaj je vi Ho mia
animo!

Ho dum mi vivas, esti reganto de vivo, ne sklavo,

Renkonti vivon kiel potenca konkeranto,

Ne fantomoj, ne enuo, ne pli da plendoj aŭ malestimegaj kritikadoj,

Al tiuj ĉi fieraj leĝoj de la aero, la akvo kaj la grundo pruvantaj

mian internan animon nekaptebla,

Kaj neniu ekstera povas komandi min.

Ne por ĝojoj de la vivo sole mi kantas, ripetante—la ĝojon de la
morto!

La bela tuŝo de Morto, kvietige kaj sensentige, kelkajn minutojn,
por kialoj,

Mi mem elverŝante mian ekskrementan korpon por bruligo, por
polvigo, aŭ por enterigo,

Mian realan korpon mi havas por aliaj sferoj,

Mia nuligita korpo ne plu gravas al mi, kaj reirante al la purigo,
aliaj servoj, eternaj uzoj de la tero!

Ho allogi per pli ol allogoj!

Kiel estas, mi ne scias, sed jen! la io, kio obeas nenion de la ceteraj,

Ĝi estas ataka, neniam defenda—ankoraŭ kiel magnete ĝi altiras.

Ho barakti kontraŭ grandaj vetŝancoj, renkonti sentime malamikojn,

Esti tute sole kun ili, eltrovi kiom oni povas toleri!

Rigardi konflikton, torturon, malliberejon, popolaran malŝaton,
vizaĝo kontraŭ vizaĝo!

Suriĝi sur eŝafodon, antaŭeniri antaŭ la buŝoj de fusiloj, tute
indiferente!

Mem esti ja dio.

Ho navigi sur maro!

Foriri for de ĉi tiu firma netolerebla tero,

Foriri for de la sameco de la stratoj, la trotuaroj, kaj la domoj,

Foriri for de vi, Ho vi solida senmova tero, kaj enirante ŝipon,

Velveturi eterne!

Ho fari de nun la vivon poemo de novaj ĝojoj!

Danci, plaŭdi, ĝojegi, salteti, salti—ruli, flosi eterne antaŭen,

Esti maristo de la mondo celante ĉiujn havenojn,

Esti mem ŝipo (vidu ĉi tiujn velojn, kiujn mi etendas al la suno kaj
aero.)

Rapida kaj ŝvelanta ŝipo plena de riĉaj vortoj, plena de ĝojoj.

Walt Whitman (1819-1892)

Esperantigis Zane Gilstrap

LA HOBBITO

de J. R. R. Tolkien

Elangligis Don Harlow

El Ĉapitro XII

[La historio de Bilbo Baggins, la Hobbito: Vizitate en sia hejmo de la sorĉisto Gandalf kaj 13 dvarvoj, Bilbo estas varbita por aventuro—vojaĝi de sia hejmo al la Soleca Monto por rekapti la oron forŝtelitan de la dvarvoj fare de la kruela drako Smaŭg antaŭ cent jaroj. Post renkontiĝo kun koboldoj kaj gastado ĉe elfoj, la dvarvoj, Gandalf kaj Bilbo estas kaptitaj de goblenoj en la kavernoj de la Nebulmontaro, kaj, eskapinte, Bilbo renkontas en tunelo la estaĵon Gollum, kiu havas Ringon de Nevidebleco. Post enigmo-konkurso, Bilbo kaptas la Ringon kaj eskapas de la tuneloj. Multaj aliaj aventuroj antaŭas ilian alvenon ĉe la Soleca Monto, kie oni komisiis al Bilbo sondi la tunelojn de la drako kaj pionire skolti ties subteran regnon.]

La suno brilis kiam li ekiris, sed estis nokte mallume en la tunelo. La lumo de la preskaŭ fermita pordo baldaŭ malaperis pro lia descendo. Tiel silente li iris, ke tion ne povus superi fumo en facila vento, kaj li emis senti iom da fiereco, kiam li alproksimiĝis al la malsupra pordo. Videbla estis nur plej pala brileto.

“Antikva Smaŭg estas laca kaj dormanta,” li pensis. “Min li ne povas vidi nek aŭdos. Feliĉu, Bilbo!” Li forgesis, aŭ eble neniam sciis, pri la flarsento de la drakoj. Estas ankaŭ ĝena fakto, ke ili povas dormante teni la okulon duone malfermita por gvati, se ili estas suspektemaj.

Smaŭg certe ŝajnis dormanta, preskaŭ mortinta kaj malhela, ronkante ne pli ol eksnufon da nevidebla vaporo, kiam Bilbo denove elrigardis de la enirejo. Li estis preta surpaŝi la plankon, kiam li rimarkis subitan mallarĝan kaj trapikan ruĝan radion aperi desub la pendanta palpebro de la maldekstra okulo de Smaŭg. Tiu nur pretekstis dormon! Li gvatis la tunelan enirejon! Bilbo rapide retropaŝis kaj benis la sorton de sia ringo. Tiam ekparolis Smaŭg.

“Nu, ŝtelemulo! Mi flaras vin, kaj mi sentas vian aeron. Mi aŭdas vian spiradon. Do venu! Prenu denove, restas multo!”

Sed Bilbo tute ne estis tiel neklera pri la drako-loro, kaj se Smaŭg esperis tiel facile venigi lin proksimen, li devis senti seniluziigon. “Dankon, ho Smaŭg la Grandega, sed ne!” li respondis. “Ne por donacetoj mi venis. Mi nur volis rigardi vin, kaj vidi, ĉu vi estas vere tiel granda, kiel rakontas la fabeloj. Mi ne kredis ilin.”

“Ĉu do?” diris la drako, iom flatite, kvankam li kredis eĉ ne unu vorton pri tio.

“Vere, la kantoj kaj rakontoj subtaksas la realecon, ho Smaŭg Ĉefa kaj Plej Granda el Katastrofoj,” respondis Bilbo.

“Vi estas bela ĝentlemano, vi ŝtelemulo kaj mensogulo,” diris la drako. “Vi ŝajne konas mian nomon, sed mi ne

memoras, ke mi antaŭe flaris vin. Kiu vi estas, kaj de kie vi venas, se mi rajtas demandi?”

“Vi ja rajtas! Mi venis de sub la monteto, kaj sub montetojn kaj trans montetojn kondukis mia vojo. Kaj tra la aeron. Mi estas tiu, kiu marŝas nevidate.”

“Tion mi ja povas kredi,” diris Smaŭg, “sed tio certe ne estas via kutima nomo.”

“Mi estas la sugeston-solvanto, la araneon-ponardanto, la pikanta muŝo. Mi estis elektita por la bonŝanca numero.”

“Belaj titoloj!” ridaĉis la drako. “Sed bonŝancaj numeroj ne ĉiam bonŝancas.”

“Mi estas tiu, kiu enterigas siajn amikojn vivantaj, kaj dronigas ilin, kaj reeltiras ilin vivantaj el la akvo. Mi venis el la fundo de sako, sed neniuj sako kovris min.”

“Ne tiom kredeblaj ŝajnas tiuj,” rifuzis Smaŭg.

“Mi estas amiko de ursoj kaj gasto de agloj. Ringogajnanto, mi, kaj Sortoportanto; kaj mi estas Barelorajdanto,” daŭrigis Bilbo, komencante senti sin kontenta pri sia enigmodo.

“Pli bone!” diris Smaŭg. “Sed ne permesu, ke via imagivo troigu!”

Tiel oni kompreneble parolu kun drakoj, se oni volas eviti riveli la ĝustan nomon (kio estas saĝa), kaj ne volas kolerigi ilin per rekta rifuzo (kio ankaŭ estas tre saĝa). Neniu drako povas rezisti la fascinon de enigmodo kaj de tempomalŝparado en provo kompreni. Multon pri tio Smaŭg tute ne komprenis (kvankam vi supozeble komprenas, ĉar vi scias ĉion pri tiuj aventuroj de Bilboj, kiujn li referencis), sed li supozis kompreni sufiĉon, kaj en sia malbona memo li klukridis.

“Tion mi pensis hieraŭ nokte,” li ridetis al si. “Laganoj, iu fia komploto de tiuj mizeraj kuvokomercantaj Laganoj, aŭ mi estas lacerto. Jam plurajn epokojn mi ne vizitas ilin, sed mi baldaŭ ŝanĝos tion!”

“Tute bone, ho Barelorajdanto!” li laŭte diris. “Eble Barelo estis la nomo de via ĉevaletto; kaj eble ne, kvankam ĝi estis sufiĉe dika. Eble vi marŝas nevidate, sed vi ne marŝis la tutan distancon. Mi diru al vi, ke hieraŭ nokte mi manĝis ses ĉevaletojn, kaj mi baldaŭ ekkaptos kaj manĝos la ceterajn. Kompense por tiu bonega manĝo, mi diru al vi unu konsilaĵon por via propra bono: rilatu kun dvarvoj nur tiom, kiom vi ne povos eviti!”

“Dvarvoj!” diris Bilbo, pretekstante surprizon.

“Ne parolu al mi!” diris Smaŭg. “Mi konas la odoron (kaj guston) de dvarvo—neniu pli bone. Ne diru al mi, ke mi povas manĝi dvarve-rajditan ĉevaletton kaj ne rimarki tion! Vin trafos malbona fino, se vi rilatas kun tiaj amikoj, Ŝtelemulo-Barelorajdanto. Kaj mi estos kontenta, se vi reiros kaj diros tion al ili.” Sed li ne informis Bilbon, ke unu odoron li tute ne konis,

la hobbito-odoron; ĝi estis tute ekster lia sperto, kaj ege konfuzis lin.

“Mi supozas, ke vi ricevis justan prezon por la pokalo de la hieraŭa vespero, ĉu ne?” li daŭrigis. “Do diru, ĉu? Tute neniom! Nu, jen dvarvoj. Kaj mi supozas, ke ili kaŭras ekstere, kaj ke via tasko estas, fari la danĝeran laboron kaj ŝteli kiom ajn dum mi ne gvatas—por ili? Kaj vi ricevos ĝustan dividajon? Tute ne kredu tion! Se vi eskapos vivanta, vi bonŝancos.”

Bilbo nun komencis senti sin vere nekomforta. Kiam ajn la vaganta okulo de Smaŭg, serĉante lin inter la ombroj, direktiĝis al li, li ekstremis, kaj lin kaptis nekларigebla emo elkuri kaj riveli sin kaj diri la tutan veron al Smaŭg. Efektive, li estis en terura danĝero, fali sub la drakosorĉo. Sed levante sian kuraĝon, li ree parolis.

“Ne ĉion vi scias, ho Smaŭg la Potenca,” diris li. “Ne sole oro tiris nin ĉi tien.”

“Ha! Ha! Vi do konfesas pri ‘ni’,” ridis Smaŭg. “Kial ne diri ‘ni dek-kvar’ kaj fini la aferon, s-ro Bonŝanca Numero? Plaĉas al mi aŭdi, ke vi havas aliajn aferojn en ĉi tiu regiono krom mia oro. Tiukaze vi eble ne tute malŝparos vian tempon.

“Mi ne scias, ĉu vi pripensis tion, ke, eĉ se vi povus pecon post peco ŝteli la oron—afero de pli-malpli cent jaroj—vi ne povus longdistance porti ĝin? Ĝi ne multe utilus montflanke, ĉu? Ankaŭ ne en la arbaro? Do benu min! Ĉu vi neniam pensis pri la truko? Dek-kvarona parto, mi supozas, aŭ io simila, tio estis la interkonsento, ĉu? Sed kion pri la liverado? Kion pri portado? Kion pri armitaj gardantoj kaj paskostoj?” Kaj Smaŭg laŭte ekridis. Li havas malbonan kaj ruzan koron, kaj li sciis, ke liaj konjektoj malmulte eraris, kvankam li suspektis, ke la Laganoj kulpis pri la planoj, kaj ke la pliparto de la rabaĵo estis intencita halti tie en la apudborda urbo kiu en lia juneco nomiĝis Esgaroto.

Eble vi ne kredos tion, sed povra Bilbo vere sentis sin konsternita. Ĝis nun li dediĉis ĉiujn pensojn kaj energion al atingo de la Monto kaj trovo de la enirejo. Neniam li pensis pri tio, kiel oni forportu la trezoron, certe neniam pri tio, kiel iu ajn parto de ĝi, lia parto, estos portita la tutan distancon al Sakfundo-Submonteto.

Nun komencis kreski en lia menso terura suspekto—ĉu la dvarvoj forgesis ankaŭ tiun gravan punkton, aŭ ĉu ili la tutan tempon priridis lin malantaŭ siaj manikoj? Tiel efikas la drakoparolado al la nespertaj. Bilbo kompreneble devis gardi sin pri tio; sed Smaŭg havis tre imponan personecon.

“Mi diras al vi,” li diris, provante resti lojala al siaj amikoj kaj subteni sian flankon, “ke la oro estis por ni nura postpenso. Ni venis trans monteton kaj sub monteton, per ondo kaj vento, por Venĝo. Certe, ho Smaŭg la netaksebla riĉa, vi certe scias, ke via sukceso kreis por vi neŝanceligeblajn malamikojn?”

Tiam Smaŭg vere ekridis—detruiga sono, kiu ĝisplanken skuis Bilbon, dum en la fora tunelo la dvarvoj kunpremiĝis kaj supozis, ke la hobbiton trafis subita kaj terura fino.

“Venĝo!” li snufegis, kaj la lumo de liaj okuloj brilis tra la halo de planko ĝis plafono kiel skarlata fulmo. “Venĝo! La Reĝo sub la Monto mortis, kaj kie estas liaj parencoj, kiuj kuraĝas postuli venĝon? Girion Lordo de Val estas mortinta,

kaj mi manĝis lian popolon kiel lupoj inter ŝafoj, kaj kie estas liaj filidoj, kiuj kuraĝas fronti min? Mi mortigas tie, kie mi deziras, kaj neniu kuraĝas rezisti. Mi sternis la antikvajn militantojn, kaj similajn oni ne trovas en la hodiaŭa mondo. Tiam mi estis juna kaj mola. Nun mi estas antikva kaj forta, forta, fortega, Enombra Ŝtelemulo!” li fanfaronis. “Mia kiraso estas kiel dekobla ŝirmilo, miaj dentoj estas glavoj, miaj ungoj—lancoj, la ŝoko de mia vosto—fulmofrapo, miaj flugiloj—uragano, kaj mia spiro—morto!”

“Mi ĉiam komprenis,” Bilbo diris per tima kriĉeto, “ke drakoj estas pli molaj sube, aparte en la regiono de la—nu—la brusto; sed sendube iu tiel fortika jam pripensis tion.”

La drako haltis fanfaroni. “Via informo estas eksmoda,” li elkrakis. “Mi estas kirasita supre kaj sube per feraj skvamoj kaj malmolaj gemoj. Neniu klingo povas piki min.”

“Tion mi konjektus,” diris Bilbo. “Vere troviĝas nenie la egalulo de Lordo Smaŭg la Nepenetrebla. Kia belegeco, posedi veŝton el brilaj diamantoj!”

“Jes, ĝi estas ja rara kaj mirinda,” diris Smaŭg, absurde feliĉa. Li ne sciis, ke la hobbitoj jam ekvidis lian pekuliaran subkovraĵon je sia antaŭa vizito, kaj jukis revidi ĝin por la propraj celoj. La drako ruliĝis. “Jen!” li diris. “Kion vi diros pri tio?”

“Mirinde bela! Perfekta! Sendifekta! Ŝanceliga!” laŭte eldiris Bilbo, sed interne li pensis: “Maljuna stultulo! Ekzistas granda regiono sur la maldekstra brusto, kiu estas nuda kiel heliko ekster la karapaco!”

Vidinte tion, s-ro Baggins havis unusolan intencon: fuĝi. “Nu, vere mi ne pli longe retenu Vian Moŝton,” li diris, “aŭ malhelpu vian bezonatan ripozon. Laboro necesas por kapti ĉevaletojn, mi opinias, post longa kurado. Simile ŝtelemulojn,” li aldonis, kiel adiaŭa rimarkigo, dum li turnis sin kaj ekfuĝis laŭ la tunelo.

Tio estis bedaŭrinda diro, ĉar la drako ŝprucigis post li terurajn flamojn, kaj kiom ajn rapide li fuĝis supren, li tute ne iris sufiĉan distancon por esti komforta antaŭ ol la timiga kapo de Smaŭg puŝiĝis kontraŭ la apertaĵo malantaŭ li. Bonŝance, la tutaj kapon kaj makzelon ne povis enŝoviĝi, sed la naztruoj eligis fajron kaj vaporon por sekvi lin, kaj li estis preskaŭ venkita, kaj blinde plustumblis en grandaj doloro kaj timo. Li antaŭe sentis sin sufiĉe lerta pro sia konversado kun Smaŭg, sed lia fina eraro skuis en lin pli bonan senson.

“Neniam priridu vivantajn drakojn, Bilbo-stultulo!” li diris al si, kaj tio poste fariĝis lia ŝatata aforismo, kaj fariĝis proverbo. “Vi certe ankoraŭ ne alproksimiĝas al la fino de ĉi tiu aventuro,” li aldonis, kaj ankaŭ tio estis vera.

© Unwin Highman Ltd.

Translation by permission

Glosaro:

dvarvo: homsimila nana estaĵo, dika kaj kun densa barbo, ŝatas loĝi subtere kaj mini oron kaj juvelojn.

gobleno: homsimila estaĵo, ankaŭ subtera, sed kruela kaj eble hommanĝa; ŝatas elveni nokte por ĝeni la homaron. En la posta trilogio *La Mastro de la Ringoj*, Tolkien renomis la goblenojn aŭrkoj.

loro: ĉiuj sciaĵoj pri kaj/aŭ de iu temo aŭ grupo da estaĵoj. Komparu folkloro.

LA INSULTATOJ

de Reginald Jaderstrom

La loka filio de la Societo por Preventi Insultojn, Ofendojn kaj Nocaĵojn renkontiĝis en sia duonmonata kunveno. Prezidis Profesoro Just de la historia fako en la universitato. Ĉiu donis raporton pri la lastatempa agado kaj progreso:

“Finfine la lokaj video-vendejoj konsentis ne plu havigi tiun kartunserion Dick Tracy de antaŭ tridek jaroj kun la karikaturnaj neblankuloj. Ili klopodos realvoki kaj detruu ĉiujn antaŭe venditajn.”

“La somera teatro konsentis aldoni rolojn por virinoj en Robinson Crusoe.”

“Ĉefkuiristo en ĉina restoracio Feliĉa Drako diris, ke tre plaĉas al li la Rambo-filmoj, precipe la tria. Mi preskaŭ konvinkis lin, ke tiu filmo insultas azianojn kaj ne taŭgas al li spekti aŭ ĝui ĝin aŭ la aliajn.”

“Mi trovis du studentojn el Japanio kiuj lernis la pseŭdolingvon Esperanto antaŭ ol ili venis al Usono. Mi klopodas evidenti al ili, ke tiu lingvo estas nejusta al orientanoj, ĉar oni elpensis ĝin por eŭropanoj. Ili eĉ monstros al mi poemkolektojn en Esperanto verkitaĵoj de japanoj. Mi esperas, ke mi konvinkos ilin ne plu uzi tiun lingvon, kaj ke ili skribos al tiuj verkistoj, instigante al ili ne plu verki aŭ eldoni tiuspecajn librojn.”

“Mi aŭdis, ke ‘Forportis la Vent’ denove aperos en la nostalgia festivalo de la kinejo Lux. Mi provos konvinki al la estro, ke tiu filmo ŝoke montras afablon de iuj mastroj kontraŭ la sklavoj. Se mi ne sukcesos malspektigi la filmon, mi aranĝos manifestacion antaŭ la kinejo. Mi esperas, ke ni povos trovi kelkajn nigrulojn aŭ aziulojn kiuj volonte ‘festacios kune kun ni.’”

“Mi aŭdis ion ĉagrenan pri lastatempa spektigo de ‘La Vinberoj de Kolero.’ Iu nigra konato mia de Oklahomo diris, ke finfine neniu nomas lin negro aŭ kolorulo aŭ ion pli malbonan: sed nun kelkaj liaj amikoj nomas lin ‘Ok!’.”

Demandis la prezidanto: “Kio pri la Disney-filmoj?”

“Tio estas afero ebe pli malfacila. Sed se ni sukcesos, preskaŭ ĉiu Disney-filmo je la reeldono malhavos la ofendajn partojn. Estus pli facile por ĉiuj, kompreneble, se ili simple ne plu reeldonus tiujn filmojn. Sed iuj kolektemulaĉoj ne konsentus pri tio. Kiel nesentema tiutempe estis tiu kompanio! Ĉu ili ne povis antaŭvidi la niatempajn morojn?”

“Dankon. Vi ĉiuj bone laboris. Kaj mi, mi preskaŭ gajnis konsenton de ĉinaj aŭtorinoj ne plu skribi pri maljustaĵo fare de la avinoj aŭ aliaj geprauloj. Tiuj egoismuloj tro facile lavadis la malpurajn tolaĵojn publike. Unu—ĝuste kiu, mi forgesis sen miaj notoj—promesis ke estonte ŝi pli emfazos la maljustaĵojn far la blankaj usonanoj kaj laŭdos la kontribuojn de sia antikva kulturo.”

Post iom pli da diskuto la kunveno fermiĝis.

Ĉiu eliris el la kunveno kaj iris al aliaj savaj taskoj. Profesoro Just eniris la aŭton kaj ekveturis urbeksteren. Subite pluvegis tiel forte, ke la stratoj tutnundiĝis en sekundoj. Vidpovo preskaŭ ne eblis, kaj okazis granda akcidento de tri aŭtoj.

Profesoro Just sentis sin kaj alian homon iri malsupren, dum tria rapide supren. Li kaj la alia sin trovis en granda kaverno apud malhela rivero. Rikana gastiga homo staris ĉe la bordo.

“Bonvenon! La pramo baldaŭ atingos nin.”

“Kio okazas?” demandis la profesoro. “Kial mi subite troviĝas en ĉi stranga, maltrankviliga loko?”

“Permesu ke mi unue prezentu vin unu al la alia. Profesoro Just, Pastro Cert.”

“Pastro Cert de la Ĝisosta Sanktskriba Eklezio! Tiu idioto!”

“Kiu estas idioto?!” demandis la alia. “Mi aŭdis pri vi, volonta nekredantaĉo! Ĉu vi neniam konvinkiĝis, ke la tuta vero troveblas simple inter la kovriloj de unusola libro?”

La du komencis interdisputi, sed la gastiganto haltigis ilin kaj diris, “Vi du kaj unu alia ĵus mortis en terura akcidento. Pro tio, vi nun atingis ĉi lokon por ricevi viajn justajn rekompencojn. Dum ĉiuj jarcentoj de jarcentoj, Pastro Cert plenlaŭte legados el la Sanktskriboj rekte en la orelojn de Profesoro Just. Kaj la profesoro enŝovados ĉiujn finlegitajn foliojn en la gorĝon de la estimata pastro.”

“Kaj la tria homo?” singultis la profesoro. “Tiu kiun mi vidis supreniri?”

“Kiu li?” demandis la pastro. “Kaj kial li iris alidirekten?”

“Li?” respondis la gastiganto. “Tiu estas s-ro Senc de via loka altlernejo. Li ĵus venis de omaĝa kunveno, kie oni premiis lin la plej elstara instruisto de la jaro. Li gvidis du programojn: unu por instigi kritikan pensadon en la gestudentoj, kaj alian por helpi ilin sukcese trakti insultojn kaj aliajn malfeliĉojn en la vivo, uzante la proprajn intelektojn kaj fortojn. Tiuspeca homo ne rajtas loĝi en ĉi tiu loko, kaj tial devis iri al la alia.”

“Do, sinjoroj, jen la pramo!”

kara leganto

mia lama irado
sur tiu ĉi tero
ronda—laŭ ies asertoj—
okazas pro la fakto ke
mi havas du piedojn
kaj dum unu pendiĝas
la alia ne povas subteni
la ĝibon
kiun mi portas
kaj kiun mi ricevis
kiel rekompencon
pro la laboro farita
per la du manoj
kiuj ne kapablas agi sendepende
ĉar mi havas nur
unu pensantan kapon
kaj de sur sia centra pozicio
ĝi ne scias kien direktiĝi:
liven dekstren liven dekstren...

Ionel Onet

KIOMA HORO ESTAS

de Ella Gibson

Per la vortoj de la franca revolucio, estas pli malfrue ol oni konscias. La homo frontas la danĝeron de sin-ekstermo. Li povus malaperi de sur la tero, kiel la dinosaŭro, la dido, kaj multaj aliaj forpasintaj specioj.

Pensu pri ĉi tiu mirinda estaĵo, la Homo. Kio ĝi estas? Biologie, la Homo estas vertebrulo, de la mambestaroj, vivonaska, dupieda, en la ordo de primatoj. Li naskiĝas en kelkaj koloroj; nigra, bruna, rozkolora, blanka, kaj intermiksaj nuancoj. Li estas ĉiomanĝa besto. Kaj li estas besto kun tiu diferenco, ke li povas ŝanĝi sian propran medion. Bedaŭrinde, tiu ŝanĝpovo enhavas la malavantaĝon, ke li devas ankaŭ suferi ĉiujn rezultojn de sia propra elektkapablo. Konsideru nur ses el la multaj eblecoj:

Unue: Laŭ la historio, iam la Homo estis simpla arbloĝanto, svingiĝanta per sia vosto en paradizo de kokosoj kaj bananoj. Ne kontenta, li malsupren grimpis, kaj eklernis piediri vertikale sur la tero. Lerta, ĉu ne? Sed pripensu la koston. Pro tiu nova maniero vojaĝi, li por ĉiam fordis sian mirindan voston.

Due: Nun, piedirante sur la tero li sentis la mankon de folioj por ŝirmi sin, do li inventis vestojn. Bona ideo, ĉu ne? Sed pripensu la koston. Nun li devas agi multe por esti en bona modo, kun ĉapelo, jaketo, pantalono, ĉemizo kaj manumbutonoj. Kaj tio estas la malpli serioza kosto; la plej grava kosto estas ke, pro la konstanta uzo de vestoj, li perdis sian propran felon. Nun li tute dependas de vestoj. Se ial ajn li ne povus havigi al si vestojn, oni horortremas pri lia malfeliĉa stato.

Tria: Iam la Homo havis nur lingvon de gestoj kaj gruntoj. Ĉiuj povis ĝin facile kompreni. Sed ĉi tiu lerta besto inventis lingvon de vortoj, kaj poste evoluigis pli ol tri milojn da komplikitaj lingvoj. Vere, estis mirinda faro,—sed pripensu la koston. Nun li ne povas kompreni fremdajn lingvojn, kaj multe suferas pro la manko de interkompreniĝo.

Kvare: Li inventis la kuirarton. Ho, kiel bongustaj estas rostviando, pano, pasteĉo, kuko, kando! Sed pensu pri la kosto. Lia kromstomako degeneris. Ĝi iĝis la vermoforma apendico, senutila, ĝenoplana. Kaj ankaŭ liaj dentoj kaviĝis. Kiam li maljuniĝas, necesas, ke li maĉu per multekosta falsa dentaro.

Kvine: Iam ĉio estis senkosta, kaj la homo nur devis kapti la bezonaĵon, aŭ fari ĝin por si mem. Sed la lerta besto ne estis kontenta kaj inventis komercon per mono. Kia lerta eltrovo ĝi estis! Ĝi tre multigis la faritaĵojn. Sed, ho ve, nun li similas al hundo ĉasanta sian voston,—neniam povanta ĝin kapti. Por aĉeti la faritaĵojn, li devas labori por gajni monon, kaj la mono neniam estas sufiĉa por aĉeti la deziratajn faritaĵojn.

Sese: Ne kontenta esti nur natura besto, li iĝis scienca besto. Ho kiajn mirindajn eltrovaĵojn kaj inventaĵojn li nun elpensis! Li elpensis batalilojn el ŝtonoj, ligno, fajro, kemiaĵoj. Li elpensis kiel labori kaj vojaĝi per maŝino; li eltrovis kiel sendi voĉojn kaj bildojn trans la aero; fine li elpensis kiel kaŭzi nukleajn eksplodojn. Sed, ho ve, la ne-eviteblajn kostojn! La bataliloj murdas amikojn; per la maŝinoj li malpurigis sian aeron ĝis

nespirindeco; per televido li narkotas sian menson; kaj pro la nuklea elpenso li devas por ĉiam vivi en timo.

Tia estas tiu rimarkinda besto. Ĉu eble li iĝos sufiĉe lerta sufiĉe frue por eviti la sorton de la dinosaŭro kaj la dido?

Kiu scias? Kioma horo estas?

El Norda Prismo, 1970(4)

VENOS MOLAJ PLUVETOJ

de Sarah Teasdale

tradukis Mack Dougherty

Venos molaj pluvetoj, odor' de humgrund',
Heltreme la son' de ĝiranta hirund'.

Laŭ flankoj, rangrakoj sub nokta sumstel',
Kaj blanke tremados sovaĝa prunel'.

Rubekoloj surprenos plumaĵon el flam';
De baril' ekfajfiĝos kaprica deklam'.

Eĉ ne unu priscius militon, ne tiu
Atentus, se fine ĝi ĉesus—neniu.

Ne unu prizorgus, nek birdo nek arb',
Se tuta la homo—pereus al karb'.

Kaj mem Primaver', je vekiĝa taglum',
Apenaŭ konscius pri la forkonsum'.

NOTOJ

de Ella Gibson

Kiel harpkordoj,
Hazarde frapitaj, ni
Vibrade sonu.

Kaj senelekte,
Ĝis la dampilo, niajn
Tonojn eldonu.

El Norda Prismo, 1969(2)

LA Batalo de Pomverda Valo

de Betty Dinneen

Samtage kiam la afiŝo "Vendota" aperis ĉe la Pomverda Arbareto, la bestoj okazigis protestkunvenon. La juna Petro Maktaviŝ ĉeestis, kiel kutime, kuŝante sur la ventro kaj maĉante herberon. Li ludadis kun la procionidoj. Sed estis Paĉjo Prociono kiu kunvenigis la bestojn. Paĉjo estis la estro de la Pomverda Arbareto—almenaŭ tiel li kredis (Panjo Prociono havis aliajn ideojn).

Paĉjo prelegis, starante sur falinta arbo.

"Ja 'stas hor' por batalo!" deklamis li, pugnigante la manon. "Ni finis jam paroli. Se tiuj fiaĉaj geviroj ŝtelos nian landon, niajn hejmojn, ni devas rebati ilin—per ungo kaj dent'! Ni ilin disŝiros!" Kaj li ekfrapis la arbon per la pugno.

"Ho, ve," diris Petro Maktaviŝ milde.

"Nu," diris Paĉjo sinĝeneme, "Vi scias, ke mi ne 'stas plendemul'. Sed ja 'stas tro. Oni ĝenas nin tie, forĉasas nin tie-ĉi. Ne 'stas alia loko por ni." Li faldis la brakojn kaj malridetis al sia aŭskultantaro, al la vicaj atentemaj de didelfoj, vulpoj, cervoj, kunikloj, marmotoj, kaj mefitoj. "Jes, lukti. Jen kion ni faros!" li firme diris...

"Nu, vi certe ne venkos," diris Petro Maktaviŝ, sin rulante sur la dorson. "Kaj vi scias tion. Nur unu malgrandega mordeto kaj viroj venos kun pafiloj kaj tiel plu, kaj poste la arbohakistoj venos, kaj la maŝinoj..." Li eksidis, timigante striitan sciuron, kaj fiksrigardis Paĉjon Procionon. "Nu, atendu momenton. Se vi vere volas savi viajn hejmojn, mi havas pli bonan ideon. Io, kion mi vidis en la televido." Kun lentugita vizaĝo serioza, sed kun okuloj petolaj, li komencis flustri en la orelon de Paĉjo Prociono.

La Pomverda Arbareto estis la lasta loko, la vere lasta loko, en la Pomverda Valo kie la bestoj vivis en paco. Ĝi kaŝiĝis ĉe unu fino de la valo, sub kruta kaj roka klifo sur kiu fluetis malsupren rivereto, kiu baldaŭ fariĝis rapidanta fluo. (Petro Maktaviŝ kaptis foksenojn en ĝi, kaj kankrojn. Tiel faris ankaŭ Paĉjo Prociono.)

Antaŭ kelkaj jaroj, la tuta valo estis sovaĝa kaj sendifekta. Subite venis la urbanoj, la planistoj kaj la homoj kun mono (kaj tiuj, kiuj monon deziris); post ili venis la buldozoj, la konstruistoj kaj la vojfaristoj, kaj finfine la homoj, zumante el la urbo en siaj bruaj aŭtomobiloj, kiel kolera abelsvarmo. Nun la valon kovris ordemaj domoj, labirintaj vojoj, lernejoj, ludejoj, kaj butikoj. Ĉio, kio restis por la bestoj estis la Arbareto.

Kaj nun la Arbareto estis vendota.

"La temp' malŝpariĝas!" diris Paĉjo al Petro. Ili komencis komploti kaj kunplani.

Sinjorino Maktaviŝ loĝis ĉe N-ro 12 Dornstrato. Ŝi estis bela virino, laborŝarĝita sed feliĉema, kaj tiel senzorga kiel eblas por virino, kiu havas kvar infanojn, malpli ol dekjarajn, ĉiuj ruĝharaj. Petro estis la plej aĝa kaj li estis naŭjara. Sed ili estis bonaj infanoj, pensis S-ino Maktaviŝ kontente, je tiu bela lunda posttagmezo kiam ŝi revenis hejmen de la Ĝardenkluba kunveno. Ŝi laŭiris la padon, admirante siajn rozojn, kaj eniris la domon.

"Petro?" ŝi vokis. "Ĝinjo, Tomĉjo, Anĉjo? Mi hejmas. Kie estas vi ĉiuj?"

Estis neniu respondo. S-ino Maktaviŝ ekrigardis en la varman dormemigan salonon, aŭskultis ĉe la bazo de la ŝtuparo. Ŝi ŝultrumis kaj malfermis la kuirejan pordon. Kaj tiam ŝi ekkriis pro hororo.

La bufedon, plankon kaj tablon ĉiujn kovris renversitaj bokaloj, teleroj, kaj potoj. Konfitaĵoj plaŭdetis, melaso fluetis, oranĝsuko gutis, biskvitoj eriĝis. S-ino Maktaviŝ faris senesperan paŝon antaŭen, kaj fuŝprenanta freneze la pordon, glitis sur platigita tomato, kaj alteriĝis sur sian netan, blulinaĵan postaĵon meze de la malordego, kiu kovris la kuirejan plankon. De tiu-ĉi loko, ŝi povis vidi, ke la malvarmuja pordo estis tute malfermita, kaj ankaŭ la pordoj de ĉiuj ŝrankoj kaj la latispordo tiel, kiel skadro de muŝoj zumis super la gluecaj surfacoj. (La procionoj kaj didelfoj [Antaŭa Gvardio] bone faris sian laboron.)

S-ino Maktaviŝ ekkriis denove—pro kolero. "Petro!" ŝi diris. "La juna friponeto! Mi nur metu la manojn sur tiun knabon!"

Kaj ne utilis al Petro protesti, kiel li laŭte faris, ke li ne kulpas. "Aŝi, Panjo," diris Petro. "Mi ne povus fari tion—eĉ se mi provus per ambaŭ manoj!" Li kun ia timo ĉirkaŭrigardis la ruinigitan ĉambron. "Mi eĉ ne suspektis, ke ĝi aspektus tiel malbone, kiel tio-ĉi," li murmuris.

Tio kompletigis la aferon. Petro Maktaviŝ iris malsate kaj dolore al la lito, ankoraŭ plendante, dum liaj fratino kaj fratetoj postrigardis lin kun admira hororo.

La stranga afero estis, ke la sama sceno ripetiĝis, kun variaĵoj, en domo post domo en Dornstrato, Kaŝtanplaco, kaj Platanacero-vojo. Neniam tiel multe da kuirejoj estis invaditaj, tiel multe da malvarmujoj estis rabbitaj, kaj neniam tiel multe da etaj knaboj estis manbatitaj.

S-ino Maktaviŝ severe komencis labori, subspire murmurante, kaj purigis sian kuirejon, kuiris la vespermanĝon, kaj pretigis la pli junajn infanojn por enlitiĝo. Ĉiuj tri estis tiel anĝelaj kiel eble je mallonga averto, kaj neniu parolis pli ol absolute necesis. Sed ĝis la tempo por enlitiĝi, Anĉjo, trijara, ne plu povis silenti.

"Panjo," li diris, turetanta la patrinan jupon. "Ne estis Petro. Estis koboldeto. Ĉu vi vidis lian spuron?" Kaj li kondukis ŝin al la kuireja pordo. S-ino Maktaviŝ mallevis sin ĝis ŝi estis samnivela kiel Anĉjo, kaj rigardadis la blankfarbitan pordon. Tie, nerimarkita, estis ankoraŭ plia gutego de konfitaĵo, kaj, jes ja, certe estis piedmarko. Manmarko? S-ino Maktaviŝ firme fermis la okulojn, kaj poste malfermis ilin denove. La marko restis.

"Hmmmmm," miris S-ino Maktaviŝ. Ŝi levis la okulojn ĝis la plafono, preter kiu ŝia plej aĝa filo, espereble, kuŝas en la lito. "Sed li certe sciis ION pri tio. Jes ja," ŝi ripetis firme al si. Kaj ŝi ekprenis Anĉjon kaj portis lin al la lito.

Estis multege da indignaj, koleraĵaj knabetoj en Pomverda Valo je tiu vespero, forigitaj frue el la lito, kaj ĵurantaj venĝon. Eble ne estis mirinde, tial, ke je la tuj sekvanta vespero, refoje

kriegoj traŝiris la iame pacan aeron de la Valo.

En domo post domo, kiam fratino enlitiĝis, aŭ patrino turnis la littukojn, panikantaj inoj ekkriegis. Kaj pro bona kialo. En domo post domo, lito post lito, serpentoj elglitis littukojn, bufoj eksaltis el sub kapkusenoj, kaj lacertoj forrapidis el malfalditaj nokto-vestoj.

Petro Maktaviŝ, kiu jam kuŝis en la lito dum iom da tempo kun la fingroj en la oreloj, trankviliĝe forprenis ilin kiam la krioj de la patrino ĉesis. Ŝi trovis ranon en ĉiu pantoflo. Li donis klarajn ordonojn al Paĉjo Prociono pri serpentoj. Li opiniis, laŭjuste, ke la propra domo devas inkluziviĝi en la gerilo. Antaŭ ĉio, la patro estis gravulo en la loka Ĉambro de Komercio, sed la patrino, li sciis, neniam pardonas lin pro serpentoj. Kaj li devis ankoraŭ vivi kun ŝi dum multaj jaroj.

La sekvanta tago estis merkredo, kaj merkredo estis la tago de la Granda Rato-Invado. Vidiĝis ankaŭ multege da musoj. La ratoj troviĝis en keloj, subtegmentoj, kaj provizejoj. La musoj troviĝis en vesto-ŝrankoj, tolaĵejoj, kaj komodoj. Kaj la ratoj kaj la musoj faris unu aferon. Ili faris nestojn, kaj por tiuj nestoj ili uzis kiam ajn materialon apude haveblan. Tiam, kiaj vestojn, littukojn, lankovrilojn, mantukojn, librojn, gazetojn, kaj peltmantelojn formetitajn por la somero.

Ĝis nun, tre malmulte da patroj ĝeniĝis pro la strangaj okazaĵoj en Pomverda Valo. Ili aŭskultis per duonorelo la rakontojn edzinajn pri petolaj infanoj kaj ĝenemaj bestoj, sed ili mem rimarkis nenion. Tio estis baldaŭe ŝanĝota.

Precize je la sepa kaj duono, je la mateno sekvanta la Grandan Rato-Invadon, S-ro Maktaviŝ malfermis la aŭtejan pordon kaj paŭziŝ por profunde spiri la varman rozodoran junimatenan aeron. La rozoj fartis bone, li pensis. Sed mi devas memoriĝi Sunjon, por ke ŝi funkciigu la ŝprucilon ĉi posttagmeze. La gazono aspektis iom seka hieraŭ vespere. La gazono! Aaaaaaaah!

Tiu glata etendaĵo verdvelura, la fieraĵo kaj ĝojo de la koro de S-ro Maktaviŝ, makuliĝis, ie tie, per etaj krudbrunaj teramasoj. Kaje ĉi kiam S-ro Maktaviŝ blankvizaĝe kaj grandokule rigardadis la restaĵon de sia gazono, marmoto aperigis sian kapon el truo, ridetaĉis, kaj rapide malavancis.

(La sama afero, kompreneble, okazis ankaŭ ĉe ĉiuj najbaraj gazonoj. La Marmota kaj Terrata Infanterio dediĉe laboris. "Kvankam mi ne nomus tion-ĉi laboro!" kiel unu terrato diris al alia.)

La viroj ankoraŭ boletis tiuvespere, kaj estis la vico de la edzinoj duonorele aŭskulti. Tio estis, ĝis noktiĝo. Je noktiĝo svarmoj de vespertoj (kaj kelkaj strigoj por bonŝanco) malsupreniris al la modernegaj domoj de Pomverda Valo. Onidire, la kriegoj estis eĉ pli laŭtaj ol tiuj, kiuj aŭdiĝis je la vespero de la serpentoj kaj bufoj.

Kiam venontmatene S-ro Maktaviŝ (kaj liaj najbaroj) trovis, ke liajn premiitajn rozojn manĝis cervoj, kaj liajn begoniojn feliĉe voris kuniklo, oni opiniis, ke okazis la plej malbona afero. Evidente, la fino de la mondo jam alvenis. Oni okazigis civitan kunvenon je sabato vespere ĉe la gimnazia aŭditorio. Ĉiu domposedanto promesis ĉeesti. Estis kolektotaj kaj mono kaj

milico por forpeli la bestaĉojn el la Pomverda Arbareto! Kaptilojn oni aĉetos, kaj venenon. Pafilojn oni pretigos.

Akurate je la sepa horo malfermiĝis ĉiu pordo en ĉiu strato en Pomverda Valo. Elpaŝis ĉiu domposedanto. Kaj el ĉiu verando, kie ili pacience atendis, aperis modesta, nigrablanka striita formo, voston alte tenanta, nazon vibriganta.

La Ŝturmsoldatoj de Paĉjo Prociono, la Grandioza Mefita Brigado, elvenis en forto.

Estas interese noti, ke la domposedantoj jam turmentiĝis dum tiu evento-plena semajno tiel, kiel ili apenaŭ hezitis nek tremetis, kiam ili preterpaŝis la atendantajn mefitojn kaj piediris rapide for al la gimnazio. Petro Maktaviŝ, en sia dimanĉa vestaro, piediranta rigide apud la patrino, apenaŭ havis tempon por fari la Venkan Signon al sia malnova amiko, Silvestro Mefito, antaŭ ol la patrino ekprenis lin for.

Estis Petro, tamen, kiu allogis al io la atenton de la gepatroj, kiam ili, kaj centoj da aliaj seriozaj homoj, eniris la gimnazion. Kiam la rapidantaj formoj malaperis en la gimnaziajn pordojn, aliaj malpli grandaj formoj vidiĝis alveni. Duope, en perfekta ordo, la bestoj de Pomverda Arbareto sekvis la domposedantojn. Duope, en perfekta ordo, ili eniris la lernejan korton. Paĉjo kaj Panjo Prociono antaŭiris, sekvataj de ĉiuj siaj geparencoj; poste venis la didelfoj, vulpoj, cervoj, marmotoj, striitaj (kaj ne striitaj) sciuroj, kunikloj, terratoj, musoj, ratoj, serpentoj, bufoj, ranoj, kaj lacertoj. Supre zumis la vespertoj kaj strigoj. Malantaŭe venis la mefitoj.

Ĉiuj bestoj sidiĝis antaŭ la gimnazio. Neniu graŭlis, kriis, aŭ blekis.

Estis la unua Besta Sidprotesto.

Tiam Petro Maktaviŝ senbrue elprenis la longan paperrulon el la krurumo de la dimanĉa pantalonon. Lasante la ŝokitajn gepatrojn gapantaj kun la najbaroj tra la gimnaziaj fenestroj, li trovis sian vojon tra la vicoj de bestoj ĝis li staris inter Paĉjo kaj Panjo Prociono. Tiam li malrulis sian aŭtorejo kaj altenis ĝin. Ĝi legiĝis:

CIVITAJN RAJTOJN POR BESTOJ
ŜPARU NIAJN HEJMOJN
KAJ
NI ŜPAROS LA VIAJN
ANKAŭ NI ESTAS *PERSONOJ!*

Se iam vi vizitos Pomverdan Valon (kaj mi esperas, ke jes), nepre vizitu la faman Sovaĝbestan Azilon ĉe Pomverda Arbareto. Tiu-ĉi loko, aĉetita per mono kolektita de la domposedantoj de la Valo ĉe forte entuziasma kunveno okazinta en la gimnazia aŭditorio, estas dediĉita por eterna uzo de la sovaĝaj bestoj. La Azilo estas fermita dum la semajno, por ke la bestoj povu vivi normalajn, pacajn vivojn, sed estas malfermita sabate kaj dimanĉe al vizitantoj, kiuj promesas respekti kaj honori ĉiujn bestojn, birdojn, reptiliojn, arbojn, plantojn, kaj insektojn, kiuj troviĝas inter ĝiaj limoj.

Vi preskaŭ certe renkontos Petron Maktaviŝ tie. Li estas Honora besto.

—(c) Kopirajto ĉe la aŭtoro
Tradukis Ĉarli Galvin, laŭ permeso de la aŭtoro